

ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 1

Januaro 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.



Novjara saluto el Brazilo.

Nia kliŝo montras (en iom malgrandigita formato) maldekstre parton de la Zamenhof-strato (« Rua Zamenhof ») en la brazila urbo Porto Alegre; dekstre nia fervora samideano D-ro Benjamin C. Camozato kun edzino kaj filino antaŭ la nomtabulo kun la enskribo « Rua Zamenhof ». Meze oni vidas ekzempleron de la memoriga poŝtmarko pri la Ora Jubileo de Esperanto. La karto estas stampita en Porto Alegre la 22.12.1937 kaj atingis nin jam la 27.12.1937 matene per aerpoŝto (« Condor » de « Lufthansa »). Nia redakcio kore respondas la salutojn kaj bondezirojn de familio Camozato.

Sur la nova vojo

**Rigardante returne al la Jubilea Jaro:
Post jaroj de krizo, stagno, eĉ malprogreso, ni dum 1937
denove faris gravan paŝon antaŭen.**

La 12-an de decembro 1936, okaze de la inaŭguro de l' Esperanto-Domo en Heronsgate/Londono, diris la prezidanto de Internacia Esperanto-Ligo, s-ro generalo Bastien, interalie la jenajn vortojn :

« Nova epoko komenciĝas por nia movado — ĝi estu grandioza ! »

Multaj opiniis tiun profetaĵon certe tro kuraĝa, ĉar ĝi estis eldirita en momento, kiam pro la krizo, pro la kontraŭlaboro

de gravaj faktoroj, precipe pro paralizo de la Esperanto-movado en Germanlando, kaj ankaŭ pro interna malpaco, niaj vicoj estis maldensigitaj, niaj fortoj lamigitaj.

Tamen, rigardante returne al la Jubilea Jaro, ni trovas multon, kio pravigas la vortojn de generalo Bastien pri komenciĝo de nova epoko por nia movado, — ni trovas multon, kio permesas al ni tute optimiste konstati ke, post jaroj de

krizo, stagno, eĉ malprogreso, ni dum 1937 la unuan fojon denove faris gravan paŝon antaŭen !

Fine, post dumjardeka klopodado kaj intertraktado, la esperantistaro — kiom ĝi kapablas meti la ĝeneralan intereson por nia afero super interesoj apartaj — trovas sin unuigita en unu internacia ligo de asociaj kaj individuaj membroj. Tiu ĉi ligo estas, kun la aliĝintaj landaj asocioj kaj ties grupoj, samtempe propaganda, instrua kaj aplika: ĝi do prezentas al la ordinara esperantisto ĉion kion li por sia esperantista okupo bezonas. Krom tio, per sia kontrakto kun « Heroldo de Esperanto », unuflanke la ligo utiligis ties servojn por si, kaj aliflanke la membroj ne plu bezonas, por esti rapide kaj fideinde informataj, aboni semajnan gazeton ne-oficialan, krom la oficiala, kiel okazis pli frue.

Tiu ĉi tuta novaranĝo, kvankam ankaŭ ĝi ne jam tute perfekta, multe simpligis la organizon de la Esperanto-movado. La esperantistaro volonte komprenis tion, kaj estis vere ĝojige, sekvi de semajno al semajno, kaj de monato al monato la konstantan, senhaltan progresadon de l' Internacia Esperanto-Ligo.

Estas utile, post paso de la Jubilea Jaro, refoje reprezenti al si tiun konstantan progresadon de IEL, la kreskantan nombron de la pagintaj membroj (ĉiuj kategorioj kune) en la fino de la unuopaj monatoj, laŭ la Oficialaj Informiloj de la Ligo mem :

Januaro	1741
Februaro	2503
Marto	5058
Aprilo	6243
Majo	7198
Junio	8282
Julio	9498
Aŭgusto	10351
Septembro	11736
Oktobro	12258
Novembro	12778

Per la stato en la fino de novembro

1937, IEL jam reatingis 75 % de la stato de UEA en 1935. En pluraj landoj la stato de 1935 estas eĉ multe superita, ekz. en Norvegujo (preskaŭ 500 %), Aŭstrio (300 %), Danlando (preskaŭ 200 %), Hungarujo, Greklando, Nov-Zelando, Bulgarujo, Usono kaj Italujo. En Britujo, Aŭstralio, Litovujo kaj Svedujo la tiama stato preskaŭ estas reatingita.

Tiuj ciferoj certe estas esperigaj, kaj ili permesas antaŭdiri regulan plian progresadon en estonteco.

Forigita estas la « dualismo », la « du-eco » de nia movado, kiu tiel longe ĝenis nian organizon, — aŭ eĉ « trieco », se oni konsideras la semajnan gazeton kiel trian « ĝenaĵon ». Kio *emas* kunlabori, tio nun jam estas kunlaboranta, aŭ aliĝos en proksima estonteco. Kio *ne* emas kunlabori, tion ni trankvile lasu aparte. Kvankam unuiĝo de ĉiuj esperantistoj, eĉ de ĉiuj mondlingvanoj, en unu potenca fronto restas dezirinda, ni konsciu ke ĉion unuiĝi sub unu ĉapelo estas afero treege malfacila. Cetero ni ne aspiru monopolon, nek por la ligo, nek por la gazeto. Ĉiu ema je kunlaborado estu bonvena; sed kiu nepre ne volas kunlabori kun la plimulto, por tiu ni ne malŝparu niajn rimedojn kaj nian valoran tempon.

La nova vojo estas trovita. La plimulto de l' neŭtrala esperantistaro jam ekmarŝis sur ĝi kaj bone progresas. Kiu volas sekvi, tiu aliĝu al la plimulto. Li estu bonvenanta! —

La elstaranta okazo de la pasinta jaro estus devinta fariĝi la *Jubilea Kongreso en Varsovio*. Ke ĝi ne fariĝis tiu elstarajo, tion kulpas la neobeo al la vortoj de l' majstro ke, en intereso de konkorda kunlaborado, la malplimulto discipline cedu al la decido de la plimulto.

Des pli bone sukcesis, laŭ Esperanta vidpunkto, la *Konferenco « Esperanto en la moderna vivo » en Parizo*. Ĝi havis unu mankon: ĝi finiĝis tro rapide.

Bone sukcesis ankaŭ la *internaciaj kongresoj* de IKUE (katolika) en Hago, de SAT (laborista) en Roterdamo, pluraj kongresoj naciaj, kaj precipe ankaŭ la *internaciaj ferioestadoj* en Danlando (Helsingör, Silkeborg, Fuglsö), Nederlando (Arnhem) kaj aliaj landoj.

Esperanto faris bonajn progresojn sur kampoj de *lernejo* (precipe en Francujo, sekve de la bona influo de l' Konferenco), *radio* (precipe Brno, Romo, Parizo) kaj *turismo*: aperis multaj novaj faldprospektoj kaj broŝuroj, parte tre luksaj kaj artisme eldonitaj. Gravaj internaciaj foiroj kaj ekspozicioj plu el-

donis siajn reklamilojn ankaŭ en Esperanto. Dum 1937 oni eĉ vaste uzis Esperanton por politikaj celoj, precipe rilate al la militoj en Hispanujo kaj Ĉinujo.

Sur poŝta kampo ni povas registri kelkajn atentindajn sukcesojn. La nederlanda poŝto eldonis serion de 24 fotokartoj kun Esperanto-teksto, la ĉeĥoslovaka poŝto eldonis du ilustritajn kartojn kun Esperanto-teksto. Sed vere elstara fakto estis la eldono de *speciala memoriga poŝtmarko okaze de la Ora Jubileo de Esperanto en Brazilo*. Ĝi signifas tian oficialan rekonon pri la valoro de nia afero, kian ni malofte spertis ĝis nun.

Grava sukceso estis ankaŭ la alpreno de *Esperanto kiel helplingvo ĉe la 34-a Eŭkaristia Mondkongreso*. Estas esperinde ke multaj gesamideanoj, precipe katolikoj, faris kaj ankoraŭ faros la necesajn klopodojn por ke tiu alpreno ne restu nur papera.

Ne speciale pri Esperanto, sed ĝenerale pri enkonduko de internacia interkomprenilo temis propono, kiun la *aŭstralia Senato* direktis al la Reĝo de Anglujo. Ni ne scias, en kiu stadio troviĝas tiu afero nunmomente. Ni esperas ke la propono de la aŭstralia Senato ne malaperos en la aktoŝranko de iu reĝa aŭ ministeria kancelario sed ke ni aŭdos ankoraŭ pri ĝiaj konsekvencoj, kiuj dezirinde estos favoraj al la mondhelplingva afero.

Ĝenerale, ni opinias, ke pri la rezultoj de la pasinta jaro por nia movado ni povas esti preskaŭ kontentaj. Sed, se en tiel malfavoraj cirkonstancoj, kiam nia movado estas paralizita en kelkaj landoj, kaj kiam en kelkaj aliaj landoj furiozas milito, ni entute ankoraŭ faris progresojn, ni dankas tion unuflanke al la celkonscia laboro de kelkaj el niaj « ĝeneraloj », kaj aliflanke al la persista, pacienca et-agado de nia armeo de fervoraj « nekonataj soldatoj »: prezidantoj de grupoj kaj kluboj, sekretarioj, kasistoj, kursgvidantoj, Cseh-instruistoj, kaj eĉ senpostenuloj, — ili ĉiuj havas sian parton el la merito pri tio, kio estas atingita en la jaro 1937, — ili ĉiuj rajtas kunĝoji pri la fakto ke, post pluraj jaroj de stagno kaj malprogreso, de ekstera persekutado kaj internaj malpacoj, la pasinta jaro denove kondukis nin gravan etapon antaŭen.

Ŝajnas ke efektive komenciĝis nova epoko por nia movado. La jaro 1937 — la lasta en la vico de l' unua duon-jarcento de nia afero — estis jaro de nova vojtrovo por la esperantistaro. *Nun la vojo estas jam trovita. Ni sekvu ĝin kuraĝe kaj senhalte!*

Kreskanta intereso pri Esperanto en Anglujo

Granda okazo por internacia montro de subteno.

Kiel jam foje raportite, internaciemaj rondoj en Anglujo ĉiam pli emas agnoski la utilon de nia lingvo. Grandaparte ĉi tio rezultas de la aktivaj paŝoj faritaj pere de la Londona Esperanto-Federacio.

En 1936 la Brita Junulara Pacmovado adoptis Rezolucion rekomendantan al la Mondjunulara Movado ke ĝi akcelu la disvastigon de Esperanto. Ĉi tiu Rezolucio estis cirkulerata al la diversaj Naciaj Junularaj Porpacaj Movadoj, kaj ankoraŭ estas sub konsidero.

La 23.10.1937 okazis plia sukceso de nia pledado. Nome, en la kadro de la I.P.C. Kongreso (Internacia Pacmovado, Brita Sekcio) en University College, Londono, partoprenis reprezentantoj de la Londona Esperanto-Federacio. En la Edukada Komisiono s-ro E. D. Durrant parolis rekomende pri Esperanto kaj aprobe estis aŭskultata de la kunveno, kiu decidis, ke ĝia Konstanta Komitato pristudu la demandon de internacia helplingvo. Estas notinde, ke la Prezidanto de tiu fakkunveno estis prof. Gilbert Murray, Prezidanto de la Plenumkomitato de la Unuiĝo por la Ligo de Nacioj. Ĉi tiu organizo estas granda kaj aktiva asocio por la celoj de la Ligo de Nacioj kaj internacia amikeco en Anglujo.

Nun oni povas ja diri, ke tiu organizo kaj aliaj emas rigardi nian lingvon ĉiam pli serioze, kaj estas ege necese ke ni montru nian aktivecon al ili. Ĉi tio estas tasko por gesamideanoj tra la tuta mondo. La eblecoj de plia laboro en Anglujo dependos de la maniero, en kiu oni respondos ĉi tiun alvokon.

Do, ĉiu asocio, grupo kaj individuo bonvole okupiĝu pri la afero jenmaniere:

1. Salutu I.P.C. pro ĝia decido pristudi la demandon de internacia helplingvo, esprimante la esperon, ke ĝi antaŭenigos la uzon de Esperanto por helpi la internacian interkomprenon kaj amikecon. Oni skribu al: I.P.C., ĉe Edukita Komitato, LEAGUE OF NATIONS UNION, 15, Grosvenor Crescent, London, S.W.1.

2. Laŭeble publikigu ĉi tiun informon en via gazetaro, esperantista kaj ne-esperantista, sendante gazetaltranĉojn al s-ro E. D. Durrant, 263-a, Kings Court, Alexandra Avenue, Harrow (Middlesex), Anglujo.

3. Sciigu al s-ro Durrant pri la rilatoj kun viaj naciaj asocioj por la Ligo de Nacioj aŭ la Mondjunulara Porpaca Movado.

(Gazetservo de Brita Esp. Asocio.)

Unueco estas Forto

Comenius kaj lia signifo por la universala lingvo

Okaze de Comenius-soleno en la nederlanda urbeto Naarden, kie la granda ĉefa pensulo estas entombigita, faris lia samlandano s-ro Glück festparoladon, el kiu ni ĉerpas la sek-vantajn ideojn. S-ro Glück proponis ĉe tiu oka-zo ankaŭ la fondon de « Comenius » Esperanto-Societo.

Jam en la 17-a jarcento (diris s-ro Glück) estis la grandaj filozofoj: la franco Descartes, la anglo Francis Bacon, la ĉeĥo Jan Amos Komensky kaj la germano G. W. Leibniz, kiuj ne nur kreis grandajn lingvajn verkojn, sed kiuj preskaŭ dum la tuta tempo de sia scienca agado serioze sin okupis pri la demando de universala lingvo kaj science starigis la fundamentojn kaj leĝojn por tia lingvo. Dank' al ilia influo, la ideo de universala lingvo tiu-tempe kvazaŭ modigis, kaj pri ĝi laboradis ne nur la tiama instruistaro sed ankaŭ potencaj monarkoj, ekzemple la imperiestroj Ferdinando III-a, Leopoldo II kaj aliaj.

Inter la instruistaro tiutempa elstaras Jan Amos Komensky (Comenius), kiu dum tridek jaroj multloke en siaj plej gravaj verkoj pedagogiaj, filozofiaj kaj filologiaj, trafe argumentante, traktis la problemon de kreata universal-lingvo. Por citi ĉion, kion li skribis pri tiu temo, oni bezonus multcentpaĝan libregon. Tial oratoro sin limigis je kelkaj citaĵoj el liaj verkoj.

Comenius, kiu skribis entute pli ol 150 verkojn, estis batalanto por la sankteco de l' homaj rajtoj, por la pacideco kaj por ligo de nacioj servonta al la kultura progresigo de la homaro. Ĉi tiu koncepto pri kulturo kaj civilizo kondukis la grandan pensulon ankaŭ al la universala lingvo.

Jam en 1640 li skribis en sia verko « Via lucis » (La vojo de la lumo) pri la mondlingvo kiu estos grava rimedo por disvastigi klercon. Interalie li diras tie ke, dezirante reformon de la tuta mondo, kiu alportu al la homaro la lumon de l' saĝeco, oni nepre bezonas aŭ scii la lingvojn, aŭ komunan lingvon universalan por ĉiuj popoloj. Ke oni povas multe pli facile regi unu lingvon, ĉar **multe pli facile ĉiuj kapablas lerni unu lingvon, ol ke ĉiu unuopulo lernu multajn lingvojn.** Ke tial estas necese, krei tian lingvon, kian ĉiu nacio kapablos facile alproprigi al si.

En sia libro « Panglottia », en kiu li sagace traktas la plej variajn leĝojn de la lingvo kaj de l' lingvoscienco, li kun plej akra logiko propagandas la ideon de perfekta nova universal-lingvo.

En sia plej granda kaj plej nobla verko « De rerum humanarum emendatione consultatio catholica » (Ĝeneralaj konsiloj pri la reformado d' l' homaj aferoj), 1644-1666, kaj en sia fama lingvosciencia libro « Linguarum methodus novissima » (Plej nova lingva metodo) li traktas la grandan kaj ĝeneralan utilecon de ununura universal-lingvo.

Same en la jaroj 1656-1670 li skribis en Amsterdam en pluraj siaj libroj pri la universal-lingvo.

En letero al la Reĝa Akademio de Sciencoj en Londono li skribas pri la neceseco, krei universalan lingvon, ĉar **la latina lingvo ne plu sufiĉas al la pligrandigintaj bezonoj.** Tion skribis homo, kiu estis unu el la plej grandaj sciencistoj kaj lingvoreformantoj ĉiutempaj, homo kiu majstris la latinan lingvon kiel nur malmultaj aliaj, kiu skribis preskaŭ ĉiujn el siaj 150 verkojn en la latina lingvo kaj kiu altgrade regis la kulturlingvojn de sia tempo. En la sama senco li skribis pri **la naciaj lingvoj**, kiujn li kategorie deklaris **netaŭgaj kiel universala lingvo, ĉar ĉiuj naciaj lingvoj postulas mult-**

jaran studadon, estante plenaj de neregulaĵoj, esceptoj kaj nelogikaĵoj.

En « Via lucis », XIX, 21, oni legas: Ni povas esperi ke la universala lingvo estos de-ko-ble pli facile, centoble pli perfekta kaj mult-oble pli harmonia, kaj ankaŭ multe pli trafa en esprimo kaj redono de l' ideoj, ol la lingvo latina.

La fundamentaj leĝoj, kiujn Comenius starigis, estas plenumitaj en **Esperanto.** Pli kaj pli tiu ĉi kulturkreaĵo do trovas adeptojn en la tuta mondo.

„Comenius“ Esperanto-Societo.

Ĉefa tasko de C.E.S. estas, sisteme kaj laŭ scienca metodo iom post iom publikigi ĉion, kion Comenius skribis pri artefarota universala lingvo. Ĉiujare aperos minimume unu 20- ĝis 30-paĝa verkaĵo, kiu fidele redonos, kion li tiurilate skribis. Ĉerte tiuj eldonoj ne nur estos interesaj por ĉiu esperantisto, sed ili ankaŭ kaj precipe bone servos por pedagogiaj, filologiaj kaj lernejoj sferoj.

Membro povas esti ĉiu esperantist(in)o, ĉiu grupo kaj ĉiu ajn organizaĵo (landa, nacia, faka ktp.). Kotizon oni ne pagos; la necesajn elspezojn kaj la eldonon de la verkoj kovros libervolaj donacoj.

Dezirantoj aliĝi, skribu al: S-ro Julius Glück, Jacob Catslaan 18, Amersfoort, Nederlando.

Ĝiusemajne esperantlingva teatro-dissendo el Paris

Dank' al la klopodoj de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto kaj la firma apogo de s-ro Lebas, Ministro de la Poŝtoj en Francujo, la esperantlingvaj teatraj radio-dissendoj de Radio Paris aŭ Paris PTT okazos ĝis Pasko ĉiusemajne, lunde. Jen la programo por januaro:

3.1.1938, Paris PTT, 22.45: **La Verbo Ami**, komedio de Pierre Mortier; traduko de G. Warnier; prezentado de E. Archdeacon; enondigo de Marc Darnault.

10.1.1938, Radio Paris, 23.00: **Esperantista kabaredo**, sub gvidado de Raymond Schwartz. **Kanzonoj**; « Kio nova? », **mont-martra revuo** de R. Schwartz; enondigo de Marc Darnault; prezentado de J. Guillaume.

17.1.1938, Paris PTT, 22.45: **La Paco**, laŭ Aristofano; adaptigo kaj enondigo de Marc Darnault.

24.1.1938, Paris PTT, 22.45: **La nobela burĝo**, de Molière; traduko de R. Levin; enondigo de Marc Darnault.

31.1.1938, Paris PTT, 22.45: **Sokrato**, de Richet; traduko de J. Cousteaux.

La tempo estas GMT (okcident-eŭropa); mezeŭropanoj aldonu unu horon, nederlandanoj aldonu 20 minutojn.

La regula daŭrigo de tiuj dissendoj kuŝas nun en la mano de l' esperantistoj. Ili nepre skribu, post ĉiu dissendo, al: **Esperantaj Radio-dissendoj, Courrier des Auditeurs, 107, rue de Grenelle, Paris 7, — konigante siajn dezirojn pri la dissendoj.**

Alvoko al geinstruistoj esperantistaj

Jam vi aŭdis kaj legis pri la starigo de la nederlanda oficejo **« Esperanto ĉe la Instruado »**. Kaj ni zorgos, ke ankoraŭ multe vi legos kaj aŭdos pri nia nova instituto kaj ĝia laboro. De kelkaj flankoj jam atingis nin simpati-esprimoj kaj bondeziroj por nia sukceso. Sed, karaj geamikoj, bonvolu bone kompreni, ke la sukceso de nia penado tiom dependos de vi, kiom de ni. Plejparte eĉ de via konstanta subteno de niaj klopodoj.

Duonan jarcenton ni nun propagandas, jardekojn ni pli malpli emfaze postuladas la enkondukon de Esperanto ĉe la instruado. Kvazaŭ instinkte ni komprenis, ke atinginte tiun celon, ni povus krei venkon. Sed, ho ve, ĝis nun ni restis vokantaj en la dezerto! La malfortaj voĉoj unuopaj perdiĝis en la senfina spacon. De nun ni alvokos la surdulojn per laŭtvokilo, tiel devigante la mondon aŭskulti nin. Ankaŭ nun ni ne alvenos « unu-du-tri! » al la fino, nur paŝon post paŝo ni atingos la celon. Multo, multego estas ankoraŭ farota. Tamen, se ĝis nun evidentaj rezultatoj ne estis montreblaj, ne ĉiuj semoj perdiĝis, kaj la kampoj prilaboriĝos. Ni daŭrigu, kuraĝe kaj... precipe sisteme. Centran punkton, de el kiu ni gvidos la batalon, ni nun havas. Grandigi, fortigi tiun centron, jen nia, via unua tasko.

Ni eklaboris. Ni petis diversajn geinstruistajn sindikatojn aliĝi al nia oficejo kaj kunlabori kun ni, por ke ni kune atingu la komunan celon. Jam antaŭ pluraj jaroj kelke da nederlandaj geinstruistaj ligoj formulis sian favoran opinion rilate al Esperanto. En 1932 diversaj profesiaj asocioj instruai aliĝis al la petskribo pri enkonduko de Esperanto kiel nedeviga fako. Nun ni petas de tiuj samaj organizaĵoj pli ol pervortan simpaton, nun ni petas pri subteno, ne nur morala, sed ankaŭ materia. Ni bezonas iliajn monon, tempon kaj laborfortojn.

Skribe kaj buŝe ni jam interrilatis kun kelkaj el tiuj organizaĵoj, klopodante konvinki ilin pri la taŭgeco de nia vidpunkto. Tiu estas, ke la enkonduko de Esperanto en la lernejojn sammulte, se ne pli, koncernas la profesiajn instruistojn ol nin esperantistojn. Temas ankaŭ pri la grava demando, ĉu estonte nefakuloj transprenu parton de la instruista, eduka laboro.

Ni ne antaŭvidas, ke ĉiuj petataj organizaĵoj tuĵ jese respondos nian inviton. Tamen pli facile ili tion faros, kiam ili rimarkos, ke ekzistas interesiĝo pri la temo en propra rondo. Jen do tasko por niaj membroj-geinstruistoj. Ili montru, ke ili ne estas indiferentaj pri la decido de sia faka organizo pri ĉi tiu afero. Ne estas nia tasko, montri al ili la irota(j)n vojo(j)n. Tamen oni permesu al ni, atentigi pri kelkaj el ili. Ekzemple oni povas sin informi ĉe loka aŭ ĉef-estraro, ĉu la celita aliĝpeto ankaŭ estis sendata al la organizo, kaj aldoni, ke oni ŝatas esti informata pri la devigo. Oni povas sin turni al tiuj estraroj kun la demando, kia estas la starpunkto de la organizo rilate Esperanton, kion ili intencas fari por efektiviĝi jam plurajn ekzistantajn programojn. Ekzistas internaciaj geinstruistaj korporacioj kaj iliaj organoj. Oni postulu la aplikon de Esperanto en tiuj revuoj, inter kiuj estas, kiuj nun aperas en tri lingvoj. En internaciaj, edukaj konferencoj kaj estrarkunvenoj oni uzu Esperanton. En propra rondo parolu kaj paroligu pri Esperanto.

Se vi ne sukcesos unuan fojon, tio ne gravas. Duan, trian fojon martelu sur la saman ambo-son. Kaj... ne forgesu, informi pri viaj sukcesoj kaj malsukcesoj.

Per sistema kuna agado ni venkos.

Sekretariejo: Valeriusstr. 109 II
Amsterdam-Zuid.

Oficejo: Esperanto ĉe la Instruado,
P. W. Baas.

Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Herongate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

Oficiala Informilo

N-ro 55. 25-an de Novembro, 1937

KOMITATO.

Aliĝis al la Provizora Komitato:
Japanujo: S-ro Ŝindo-Seitaro.
La elekto de la definitiva Komitato okazos dum printempo 1938.

PERANTO.

Argentina — nova adreso:
S-ro Giordano B. Lopez, El Rastreador 360, Buenos Aires.

NOVAJ DELEGITOJ.

Britujo.
Aberdeen (Skotlando). — VD: E. Lentz, 82, Blenheim Place.
FD. (Fotografado): La VD.
Birkenhead (Cheshire). — D: G. W. Keiller, 53, Cecil Road, Prenton.
Canterbury (Kent). — D: A. G. Tucker, « Aurelia », Cherry Drive.
London. — FD. (Kooperativismo): D. Froome, 8, North View, W. 5.

Japanujo.

Osaka. — FD. (Medicino): Ŝiroo Matano, Sonesaki-kami III, 47 Kitaku.

SANGOJ.

Ĉeĥoslovakujo.

Turĉiansky Sv. Martin. — Pro trookupaco eks-
iĝis la VD, S-ino Rummanova-Stepitova.

SUBTENANTOJ.

La jenaj japanaj samideanoj afable aliĝis kiel Membro-Subtenantoj, 1937:
134. D-ro Hazime Asada, Tokio.
135. T. Kuwahara, Osaka.

UNIVERSALA KONGRESO — LONDONO 1938

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 321 el 21 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario.

Usono.

Detroit. — D: (Nova adreso) J. H. Murray, 5935, Phillips Avenue, Dearborn, (Route 1), (Michigan). Iom ekster la urbego.

MEMBRO-SUBTENANTOJ, 1938.

La jenaj gesamideanoj afable aliĝis kiel Subtenantoj por 1938:

1. Hugo Popper, Böhmisch Kamnitz, Ĉeĥoslovakujo.
2. T. L. C. Bluett, Worthing, Anglujo.
3. D-ro C. B. Fawcett, London, Anglujo.
4. J. C. Bley, Chicago, Usono.
5. W. Harvey, Edinburgh, Skotlando.
6. F-ino H. Monod, Morges, Svisujo.
7. J. Holland, Leighton Buzzard, Anglujo.
8. H. Davies, Manchester, Anglujo.
9. F. W. Shaw, Whitworth, Anglujo.
10. J. Rambuousek, České Budejovice, Ĉeĥoslovakujo.
11. F-ino A. Christensen, Ambur, Hindujo.
12. L. A. Churchill, Derby, Anglujo.
13. F-ino A. B. Edwards, Bishop Auckland, Anglujo.

PATRONO.

Bonvole aliĝis kiel Patrono por 1938:
1. W. E. Clayton, London, Anglujo.

MEMBRO-STATISTIKO.

Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de Novembro, 1937:

Asociaj Membroj	10104
Individuaj Membroj:	
MJ	1173
MA	998
MAH	250
MS	135
DM	74
HM	31
Patronoj	13

2674

12778 en 60 landoj.

Korespondajoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Novembro, 1937:

Ricevitaj	747
Senditaj	1703

2450

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 349.

C. C. GOLDSMITH,
Ĝenerala Sekretario

INTERNACIA KONKURSO

Stato je la 30a de Novembro 1937.

	POENTOJ		%
	1935	1937	
1. Norvegujo	120	580	483.3
2. Aŭstrujo	255	739	298.8
3. Danujo	585	1118	191.1
4. Hungarujo	490	619	126.3
5. Grekujo	110	137	124.5
6. Nov-Zelando	210	260	123.8
7. Bulgarujo	75	92	122.6
8. Usono	1264	1503	119.0
9. Italujo	560	591	105.5
10. Britujo	6469	6437	99.5
11. Aŭstralio	470	429	91.3
12. Litovujo	150	135	90.0
13. Svedujo	2984	2682	89.8
14. Belgujo	2081	1722	82.7
15. Azio	1615	1321	81.8
16. Sud-Ameriko	1025	819	80.0
17. Portugalujo	395	307	77.7
18. Kanado	100	74	74.0
19. Francujo	7909	5818	73.5
20. Ĉeĥoslovakujo	4040	2429	60.1
21. Nederlando	4815	2827	58.7
22. Polujo	685	318	46.4
23. Jugoslavujo	615	252	41.0
24. Afriko	395	137	34.7
25. Finnlando	195	61	31.5
26. Latvujo	265	55	20.8
27. Rumanujo	400	45	11.2
28. Svislando	1410	137	9.7
29. Estonujo	130	5	3.8
30. Hispanujo	2080	15	0.7
41897 31664			75.6

Meza %

Oficiala Informilo

N-ro 56. 2-an de Decembro, 1937.

NOVA PERANTO.

Latvujo.

Ernests Erhards, Marijas iela 6, Liepaja.

NOVAJ DELEGITOJ.

Britujo.

Willaston (Cheshire). — D: J. F. Jackson, Mead Cottage, Street Hey Lane.

Danujo.

Aarhus (Jylland). — FD. (Komerco): M. P. Palsberg, Nyborggade 3-II.

Japanujo.

Okayama. — D: H. Yagi, Medicina Universitato.

SANGOJ.

Britujo.

Birmingham. — Pro translokiĝo provizore ne estas D.

IEL-anoj

repagu vian kotizon por
la kuranta jaro! Plifaciligu
la laboron de la Centra
Oficejo! Tio estos ankaŭ
en via propra intereso!

Oficiala Informilo

N-ro 57. 9-an de Decembro, 1937.

NOVA ĈEFDELEGITO.

Laŭ paragrafo 22 de la Statuto, la Prezidanto nomis kiel Ĉefdelegiton por NOV-ZELANDO: S-ron V. J. Leck, 189, Vivian Street, Wellington, C.2.

NOVAJ DELEGITOJ.

Latvujo.
Valmiera. — FD. (P.T.T.): E. Dance, Pasta kantoris.

Norvegujo.
Harstad. — D: O. T. Nicolaisen, Storgaten 31.
Haugesund. — D: O. Thormodsen, Haugeveien 88.
Sulitjelma. — D: R. Dobakk.

Svislando.
Bern. — D: O. Walder, Wiesenstrasse 56.

MEMBRO-SUBTENANTOJ.

La sekvantaj samideanoj bonvole aliĝis kiel Subtenantoj (1938):
14. D. Christie, Aberdeen, Skotlando.
15. W. T. Gayfer, Cleethorpes, Anglujo.
16. Dr. S. Kamaryt, Bratislava, Ĉeĥoslovakujo.

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.

Aliĝis ĝis hodiaŭ 396 el 22 landoj.

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 58. 16-an de Decembro, 1937.

ĈEFDELEGITO.

Danujo.
Pro tro da laboro devis ekŝiĝi nia dana ĉefdelegito, S-ro Martin Palsberg. Ni sincere esprimas al S-ro Palsberg niajn dankojn pro la ĉiam akurata kaj efika maniero laŭ kiu li ĝis nun laboris por IEL, kaj ni ĝojas ke li restos kun ni kiel Fakdelegito por komerco en Aarhus. Kiel la novan danan ĉefdelegiton ni bonvenigas:

S-ron C. N. Hougaard, de Mezasvej 17, Aarhus.

PERANTO.

Finnlando.
Kiel peranton en Finnlando, IEL ĵus nomis: S-ron Joel Vilkkii, Somero.

NOVAJ DELEGITOJ.

Britujo.
Manchester. — (Nova D.): L. Hesling Addie, 23, Deyne Avenue, Rusholme, Manchester 14.

Hungarujo.
Diósjenő (Nógrád m.). — D: F. Végh.

Polujo.
Kraków. — D: D-ro L. Rosenstock, ul. Stolarska 13.

ŜANĜOJ.

Britujo.
London. — FD. (Optiko): E. W. Woodruff, (nova adreso): 6, Roundwood Way, Banstead, (Surrey).

NOVA DUMVIVA MEMBRO.

S-ro Heinrich Peter, Wien, Aŭstrujo.

PATRONO 1938.

2. S-ro T. J. Gueritte, Surbiton, Anglujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ, 1938.

17. S-ro J. Ravestein, Den Haag, Nederlando.
18. S-ino J. M. Ravestein, Den Haag, Nederl.
19. S-ro J. v. d. Steur, Voorburg, Nederlando.
20. S-ro J. H. Roosdorp, Bussum, Nederlando.
21. S-ro P. H. Mooij, Den Haag, Nederlando.
22. S-ro P. Lebrun, Kreuzlingen, Svislando.
23. S-ro L. E. Tregubenko, Leningrad, Sovetunio.
24. S-ro W. Davies, Swansea, Anglujo.
25. S-ro D. Ponti, Nederlando.
26. S-ro C. H. Toms, London, Anglujo.
27. F-ino A. Fotherby, Surbiton, Anglujo.
28. S-ro C. A. Baker, Bath, Anglujo.

KOTIZOJ 1938.

Tiuj membroj, kiuj deziras ricevi la gazeton sen ia interrompo estas petataj pagi siajn kotizojn senprokraste.

GRAVA AVIZO.

En multaj landoj, sendante poŝtmandaton oni aldonas sur la poŝtmandaton mem informon pri la CELO de la pago. En Britujo, tamen, la poŝtoŭficejo ne transdonas tian informon. Tial, sendante monon al ni per poŝtmandato, estas nepre necese, ke oni ĈIAM SENDU SAMTEMPE POŝTKARTAN SCIIGON rekte al nia Centra Oficejo.

LONDONA KONGRESO.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 477.

La Estraro, Komitato, kaj Oficistaro deziras al ĉiu membro kaj samideano tre feliĉan novjaron.

C. C. GOLDSMITH,
Generala Sekretario.

Oficiala Informilo

N-ro 59. 22-an de Decembro, 1937

NOVAJ DELEGITOJ.

Argentino.
Esperanza (Santa Fe). — D: A. Schneider, strato Castelli.

Hispanujo.
Puigcerda (Girona). — D: J. Ravetllat, Puigcerda-Ventajola.

Latvujo.
Liepaja. — D: M. Meiers, Ganibu iela 147.
FD. (Skoltismo): A. Bertovskis, Indrika iela 5.
Riga. — FD (Turismo kaj ĵurnalismo): F-ino L. Jevsejeva, Reformatu iela 14-5.
Valmiera. — D: E. Dance, Pasta kantoris.

Usono.
Bradenton (Florida). — D: D-ro C. Stockard, 209, 16th-Street N.

ŜANĜOJ.

Danujo.
Ĉefdelegito. (Nova adreso): S-ro C. Hougaard, Regnersgade 14, Kongsvang, Aarhus.

Usono.
Atlanta. — D. translokiĝis al Bradenton — vidu supre.
Escondido. — Nova adreso: D: W.W. Carpenter, 505, E-5th Avenue.

UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.
Aliĝoj ĝis hodiaŭ: 535 el 24 landoj.

Internacia Esperanto-Ligo

Kion la Ligo celas kaj donas

La Ligo estas neŭtrala rilate al religio, nacieco kaj politiko.

IEL CELAS :

Disvastigi la uzadon de la internacia help-lingvo Esperanto.

Plifaciligi la rilatojn inter la homoj sen diferenco pri raso, nacieco, religio aŭ lingvo.

Krei internaciajn servojn uzablajn de ĉiuj homoj.

Kreskigi inter siaj membroj fortikan ligilon de solidareco.

IEL KONSISTAS :

El la Landaj Esperantistaj Asocioj en preskaŭ ĉiuj landoj.

El dektri mil membroj diverslandaj.

El centoj da Delegitoj, Vic-Delegitoj kaj Fak-Delegitoj en preskaŭ ĉiu lando de la mondo, kiuj respondas la informpetojn de la membroj kaj helpas ilin okaze de vojaĝo.

El Patronoj, kiuj konsentas pagi pli altan kotizon por helpi al la internacia movado.

IEL LABORAS :

Por konstrui bone ordigitan kaj fortan centron de esperantista agado.

Por plifaciligi al siaj membroj la praktikan uzadon de la lingvo.

Por propagandi la lingvon en ĉiuj rondoj per kunlaboro kun la landaj kaj fakaj asocioj. La sukceso de tiu laboro multe dependas de la nombro de la personoj, en kies nomo la Ligo rajtas paroli.

IEL DONAS :

Al la **Membro kun Jarlibro (MJ)**: Membrokarton, servokuponaron kaj la Jarlibron.

Al la **Membro-Abonanto (MA)**: Membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton **Esperanto Internacia** dum la jaro.

Al la **Membro-Abonanto-Heroldo (MAH)**: Membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la semajnan gazeton **Heroldo de Esperanto** dum la jaro.

Al la **Membro-Subtenanto (MS)**: Membrokarton, servokuponaron, la Jarlibron kaj la monatan oficialan gazeton; krom tio li rajtas ricevi premion.

NOTO: La oficialaj gazetoj estas « Esperanto Internacia » monate kaj « Heroldo de Esperanto » semajne.

LA JARLIBRO enhavas liston de la Delegitoj kaj la Grupoj tra la mondo, detalojn pri la organizaĵoj kaj gazetoj esperantistaj, raportojn pri la stato de la movado en la diversaj landoj, raportojn pri la lasta Kongreso kaj multajn interesajn artikolojn.



OFICIALA INFORMILO

Organiza Komitato. — Sekretario: C. C. Goldsmith. Help-sekretarioj: E. W. Amos kaj f-ino E. C. Goldsmith. Membroj: f-ino R. A. Davey (Prezidanto de la Londona Esperanto-Federacio), W. A. Gething (Konsilanto de B. E.A.), H. W. Holmes (Prezidanto de la Londona Esperanto-Klubo), s-ino N. Holmes, Bernard Long (Honora Sekretario de B.E.A., Komitato de IEL), A. C. Oliver (Estrarano de IEL., Konsilanto de B.E.A.), Fred Wadham (Ĉefredaktoro de The British Esperantist), s-ino E. Warren (Sekr. de la Londona Esperanto-Federacio), R. B. Wilkinson (Sekretario de B.E.A.).

Adreso por leteroj. — Sekretario, 30a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Kongresejo. — University College, Universitato de Londono.

Kotizoj. — Ĝis 31-3-38, £1-5-0; post 31-3-38, £1-10-0. La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj, pagas la duonon de ĉi tiuj sumoj. Estas oportune sendi kotizojn en registrita letero per britaj ŝtataj monbiletoj, haveblaj ĉe bankoj kaj monŝanĝejoj en multaj urboj. Se oni sendas pagojn per poŝtmandatoj, oni ĉiam sendu samtempe informon pri la **nomo kaj adreso de la sendinto** kaj la celo de la pago, ĉar la brita poŝtadministracio ne skribas mesaĝojn sur poŝtmandatoj. La poŝtĉekonta sistemo ne ekzistas en Britujo. Ĉekoj kaj aliaj pagiloj estu pageblaj al Internacia Esperanto-Ligo.

Blinduloj. — Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos kongreskartojn senpage, sed iliaj aliĝoj devas esti aprobitaj de s-ro W. P. Merrick (kasisto de la Blindula Ligo), Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo.

Aliĝiloj. — Nun haveblaj ĉe la kongresoficejo, kaj ĉe la ĉefaj gazetoj kaj Landaj Asocioj.

Donacoj. — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por helpi al la plena sukceso de la Kongreso. Donacoj jam ricevitaj £8-8-3.

Blindula Kaso. — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por ebligi, ke blinduloj partoprenu la Kongreson. Jam ricevita £13-8s.-2p.

Glumarkoj. — Oni presis belajn kongresajn glumarkojn, kaj ili estas nun pretaj. Prezo por kvindek, 5 pencej aŭ 2 internaciaj respondkuponoj.

Loĝado. — Kiel eble plej baldaŭ oni dissendos loĝmendilojn. Intertempe, povas esti, ke la jena informo utilos:

Hoteloj: lito kun matenmanĝo, po 4,5 ĝis 14

ŝilingoj ĉiutage. (Alilandanoj notu, ke la angla matenmanĝo estas iom ampleksa). Oni ankaŭ esperas aranĝi pli malkarajn loĝejojn.

La Organiza Komitato ne garantios loĝejon al iu ajn kongresano, kies aliĝilon ĝi ne estos ricevinta antaŭ la 1-a de julio.

Manĝoj. — La ordinara prezo por lunĉo en restoracio estas 1 ĝis 3,5 ŝilingoj. La « temanĝo » kostas de naŭ pencej ĝis du ŝilingoj. La vespermanĝo, de 1,5 ĝis 5 ŝilingoj.

Fakaj kunvenoj. — Organizantoj bonvolvu anonci frue siajn dezirojn.

Oficiala organo. — Ĉiu kongresano ricevos la gazeton THE BRITISH ESPERANTIST de januaro ĝis julio, kaj poste la numeron, kiu enhavas la raporton pri la Kongreso. Se kongresano jam abonas la gazeton, oni esperas, ke li ne ĉesigos la abonon, sed fordonos la duan ekzempleron por propagandaj celoj.

PROVIZORA PROGRAMO DE LA KONGRESO.

Sabaton	Interkoniga Vespero.
Dimanĉon	Oficiala Inaŭguro. Diservoj. Muzika Vespero.
Lundon	Laborkunsido. Fotografado. Teatraĵo.
Mardon	Fakaj Kunsidoj. Senceremonia Vespero.
Merkredon	Tuttagaj kaj Duontagaj ekskursoj.
Ĵaŭdon	Laborkunsido. Fakaj Kunsidoj. Internacia Balo.
Vendredon	Laborkunsido. Popol-dancado kaj Koncerto.
Sabaton	Fermo.

EKSKURSOJ.

Merkredo estos la tago de la plej gravaj ekskursoj. Okazos kvar, laŭ la jenaj detaloj:

1. Rondveturo en Shakespeare-lando, kun vizito al la Kastelo de Warwick, Stratford-on-Avon, (naskodomo de Shakespeare), kaj Oxford. Kosto: £1, inkluzive de tagmanĝo kaj temanĝo.

2. Simila rondveturo tra la bela suda regiono al Hastings kaj Eastbourne, ĉe la marbordo. Kosto: kredeble 12,5 ŝil., kun tagmanĝo.

3. Windsor kaj Hampton Court, kun vizito al la Palacoj. Kosto: 10 ŝil., kun temanĝo.

4. Al Whipsnade, la bela, natura zoologia parko en la kamparo. Kosto: kredeble 6 ŝil., inkluzive de la enirprezo.

Post proksimume du monatoj ni dissendos

plenan informon kun mendiloj. Krom la supremenciitaj, oni aranĝas multajn ekskursojn en Londono mem, matene, posttagmeze, kaj vespere. La kongresanoj ankaŭ povos partopreni ekskursojn sur la rivero Tamizo, kun vizito al la tre interesa havenego.

POSTKONGRESAJ ARANĜOJ

A. Sep-taga ripoza libertempo tuj post la kongresa en High Leigh, Hoddesdon. High Leigh estas bonege ekipita gastodomo en la beleta kamparo, proksimume 30 Km. de Londono. Dum la mateno okazos prelegoj de la bone konata Cseh-instruisto Sigismundo Prágano pri la Literaturo de Esperanto. Posttagmeze okazos libervolaj ekskursetoj kaj vagadoj, kaj vespere koncertoj, dancoj, kaj neformalaj aranĝoj. La celo de tiu ĉi semajno estas, ke ĝi estu kvazaŭ ripozo post la kongres-tagoj. La kosto por la semajno estos £ 3,5. Tiu prezo enhavas ĉion, kun la escepto de la tute malalta veturkosto de Londono. Ĉar estas loko por nur cent gesamideanoj, frua aliĝo estas konsilinda.

B. Ankaŭ tuj post la kongreso okazos granda ekskurso al Skotlando. Mallonge la detaloj estas jene: De Londono oni veturos fervoje al Glasgow, kaj la postan tagon okazos tuttaga aŭtoĉara rondveturo al Ardishaig, de kie oni reiros al Glasgow per ŝipo sur la lagoj kaj rivero. La trian tagon oni ĝuos viziton al la grandioza Ekspozicio de la Brita Imperio en Glasgow. Je la sekvanta tago la karavano iros fervoje al Balloch, boate sur la fama lago Loch Lomond al Inversnaid, aŭtoĉare al Stronachlacher, boate sur Loch Katrine al Trossachs Pier, aŭtoĉare al Callander, kaj finfine fervoje al Edinburgh. La mateno de la kvina tago oni pasigos per rondveturo en la urbego, kaj la postan tagon okazos tuttaga rondveturo en la Scott regiono. Fine, post la interesplena semajno, oni la sepan tagon fervoje reiros de Edinburgh al Londono. Kosto, inkluzive de ĉiu, iom malpli ol £13.

Vojaĝ-oficejo. La oficiala kongresa vojaĝ-oficejo estas la mond-konata firmo Thomas Cook-Wagon Lits. La kongresa komitato esperas aranĝi pri rabatitaj biletoj en multaj landoj.

Banko. Kongresanoj povos ŝanĝi monon kaj fari aliajn bankaferojn ĉe speciala kontoro, kun Esperante-parolantaj oficistoj, starigota de Midland Bank Ltd. (la plej granda banko en la mondo) en la Kongresejo.

Presajoj. En la kongresejo kaj kongresaj kunvenoj oni rajtos disdoni cirkulerojn kaj ĉiajn aliajn presajojn nur post antaŭa aprobo de la kongresa komitato.

Dokumentaro. La sama postulo rilatas al presajoj disdonotaj kun la oficialaj kongresdokumentoj; tio estas, ili devos ricevi la antaŭan aprobon de la komitato kaj devos alveni ĉe adreso indikota, plej malfrue du semajnojn antaŭ la kongreso.

Membraro. Ĝis la hodiaŭa dato (16.12.37) aliĝis al la kongreso 477 personoj el 22 landoj.

Por la Organiza Komitato,
Cecil C. Goldsmith,
Sekretario.

Nun jam pli ol 800 Kongresanoj

anoncis sin por partopreni la 30-an Universalan Kongreson de Esperanto en Londono. Tiu eksterordinare granda nombro, sep monatojn antaŭ la Kongreso, rajtigas nin atendi, ke nia Trideka fariĝos denove potenca manifestacio por la ideo de lingvo internacia.

Ankaŭ vi anoncu vin frutempe !

Kvara listo de kongresanoj

20. F-ino G. Houldsworth, Fleetwood, Anglujo.
 21. P. W. Baas, Amsterdam, Nederlando.
 22. P. Hendriks, Leeuwarden, Nederlando.
 23. J. Couteaux, Paris, Francujo.
 24. F. Heikenwälder, Prostejov, Ĉeĥoslovakujo.
 25. R. Petit, Rosny-sous-Bois, Francujo.
299. F-ino M. C. Groen, Ilford, Anglujo.
 300. S-ino M. J. Vuyck-Ritsema, Schalkhaar, Nederlando.
 301. F. C. Midas, London, Anglujo.
 302. F-ino D. M. Fall, London, Anglujo.
 303. F-ino D. R. Perry, London, Anglujo.
 304. F-ino G. C. Herbit, London, Anglujo.
 305. F-ino B. Richards, London, Anglujo.
 306. S. C. Roffey, Worthing, Anglujo.
 307. S-ino M. Forster, Bishop Auckland, Angl.
 308. T. Forster, Bishop Auckland, Anglujo.
 309. F-ino M. E. Smith, Southend-on-Sea, Ang.
 310. F-ino M. E. Wagland, Sheffield, Anglujo.
 311. F-ino S. H. Boocock, Bradford, Anglujo.
 312. N. N. Forbes, Liverpool, Anglujo.
 313. F-ino J. Terrijn, Gent, Belgujo.
 314. F-ino M. Lijcke, Gent, Belgujo.
 315. F-ino A. Begodt, Zeevergen, Belgujo.
 316. S-ino E. Noge, Dunkerque, Francujo.
 317. M. Noge, Dunkerque, Francujo.
 318. F-ino J. H. Meuriot, Paris, Francujo.
 319. F-ino D. Abercrombie, Paris, Francujo.
 320. S-ino E. H. Sturmer, London, Anglujo.
 321. K. R. C. Sturmer, London, Anglujo.
 322. S-ino C. B. Fawcett, London, Anglujo.
 323. Prof. C. B. Fawcett, London, Anglujo.
 324. H. T. Gardner, Southend-on-Sea, Anglujo.
 325. F-ino J. Caw, Edinburgh, Skotlando.
 326. S-ino H. V. Cooper, Bromley, Anglujo.
 327. F-ino D. Fribert, London, Anglujo.
 328. F. Sons, London, Anglujo.
 329. H. Wärd, London, Anglujo.
 330. F-ino K. M. Wollidge, London, Anglujo.
 331. F-ino A. Larkin, London, Anglujo.
 332. W. Green, London, Anglujo.
 333. F-ino E. W. Gosling, London, Anglujo.
 334. F-ino P. Dothie, London, Anglujo.
 335. P. Meakins, Ruislip, Anglujo.
 336. S-ino L. Penny, Ruislip, Anglujo.
 337. S-ino D. M. Worcester, London, Anglujo.
 338. A. W. Worcester, London, Anglujo.
 339. F-ino M. Lockwood, London, Anglujo.
 340. W. K. Nash, Watford, Anglujo.
 341. S-ino M. Nash, Watford, Anglujo.
 342. Z. Szejnberg, Warszawa, Polujo.
 343. F-ino E. Baldwin Smith, Barry, Kimrujo.
 344. G. Stewart, Glasgow, Skotlando.
 345. G. G. Lanham, Croydon, Anglujo.
 346. S-ino R. S. Neal, London, Anglujo.
 347. F-ino E. Bartlett, Romford, Anglujo.
 348. F-ino L. Greene, London, Anglujo.
 349. F-ino E. Sykes, London, Anglujo.
 350. I. Alvarez, Madrid, Hispanujo.
 351. S-ino F. Alvarez, Madrid, Hispanujo.
 352. G. Warnier, Paris, Francujo.
 353. S-ino R. Warnier, Paris, Francujo.
 354. S-ino L. E. Blacklock, Bournemouth, Ang.
 355. S-ino M. A. Marks, London, Anglujo.
 356. S. P. Marks, London, Anglujo.
 357. F-ino E. J. Dovey, Hove, Anglujo.
 358. F. H. Turner, Rochester, Anglujo.
 359. C. J. S. Kitching, Purley, Anglujo.
 360. B. O. Price-Heywood, Formby, Anglujo.
 361. E. Schmitt, Nancy, Francujo.
 362. S-ino M. Schmitt, Nancy, Francujo.
 363. F-ino E. J. Steinmeijer, Hilversum, Nederl.
 364. S-ino C. H. Horning-Regter, Hilversum, N.
 365. T. H. Hallerstrom, Vingaker, Svedujo.
 366. F-ino J. Thring, Coltishall, Anglujo.
 367. C. W. Tubb, Paignton, Anglujo.
 368. S-ino E. L. Osmond, London, Anglujo.
 369. J. H. Murray, Detroit, Usono.
 370. O. Walder, Bern, Svisujo.
 371. F-ino M. L. Edwards, London, Anglujo.
 372. C. H. Bingham, London, Anglujo.
 373. S-ino D. M. Bingham, London, Anglujo.
374. J. H. Spence, London, Anglujo.
 375. R. Scott, Letchworth, Anglujo.
 376. J. W. Pickard, Manchester, Anglujo.
 377. J. Weir, Thornton Heath, Anglujo.
 378. T. W. Roff, London, Anglujo.
 379. J. V. Moffat, London, Anglujo.
 380. F. Sutcliffe, Gateshead, Anglujo.
 381. S-ino E. Pascoe, Sheffield, Anglujo.
 382. P. V. Pascoe, Sheffield, Anglujo.
 383. F-ino M. Kaye, Huddersfield, Anglujo.
 384. N. Roscoe, Croydon, Anglujo.
 385. F-ino A. B. Howlett, Bushey, Anglujo.
 386. M. Roost, Anvers, Belgujo.
 387. P. Th. Justesen, Fannerup, Danlando.
 388. G. A. Dauris, London, Anglujo.
 389. S-ino K. D. Cockrell, Woodbrige, Anglujo.
 390. F-ino D. R. Cockrell, Woodbridge, Angl.
 391. F-ino P. M. Strapps, Ilford, Anglujo.
 392. S-ino M. J. Strapps, Ely, Anglujo.
 393. F-ino C. A. Le Fèvre, London, Anglujo.
 394. F. T. Cockrell, Woodbridge, Anglujo.
 395. W. M. Goodes, Uppminster, Anglujo.
 396. S-ino A. W. Goodes, Uppminster, Anglujo.
 397. W. Mead, Romford, Anglujo.
 398. R. W. F. Kyftenbelt, Nice, Francujo.
 399. L. van Ameyden, Nice, Francujo.
 400. D. Christie, Aberdeen, Skotlando.
 401. F-ino E. Garraway, Sheffield, Anglujo.
 402. F-ino Edith Garraway, Sheffield, Anglujo.
 403. F-ino M. H. Skeate, London, Anglujo.
 404. V. V. Sumfield, Eastbourne, Anglujo.
 405. S-ino R. A. Sumfield, Eastbourne, Anglujo.
 406. S-ino M. Scott, Letchworth, Anglujo.
 407. G. Saget, Elbeuf, Francujo.
 408. F-ino M. Sidders, London, Anglujo.
 409. F-ino S. E. Kirby, London, Anglujo.
 410. F-ino M. Barnes, London, Anglujo.
 411. W. G. Pickard, London, Anglujo.
 412. S-ino G. Kavanagh, London, Anglujo.
 413. S-ino F. E. Gould, Goodmayes, Anglujo.
 414. F. W. Armitage, Winscombe, Anglujo.
 415. S-ino I. L. Armitage, Winscombe, Anglujo.
 416. S-ino Beau, Marseille, Francujo.
 417. Prof. J. P. Beau, Marseille, Francujo.
 418. P. H. Lewis, Didcot, Anglujo.
 419. D. Ponti, Den Haag, Nederlando.
 420. J. Hesketh, Birmingham, Anglujo.
 421. F-ino S. Andrrsson, Vrena, Svedujo.
 422. F-ino A. Nilsson, Ektorp, Svedujo.
 423. G. Johansson, Stockholm, Svedujo.
 424. F-ino R. Ohlsson, Borås, Svedujo.
 425. F-ino L. Paulsen, Borås, Svedujo.
 426. F-ino V. Björk, Borås, Svedujo.
 427. S-ino I. Bellatti, West Wickham, Angl.
 428. S. Bellatti, West Wickham, Anglujo.
 429. F-ino A. Williams, Stretford, Anglujo.
 430. F-ino A. Lavender, Timperley, Anglujo.
 431. S-ino A. E. Bagguley, Twickenham, Angl.
 432. F. A. Bagguley, Twickenham, Anglujo.
 433. G. A. Ferguson, Lincoln, Anglujo.
 434. J. S. Finch, London, Anglujo.
 435. S-ino B. Ames, London, Anglujo.
 436. B. F. Ames, London, Anglujo.
 437. F-ino D. G. Piper, London, Anglujo.
 438. F-ino C. A. Cork, London, Anglujo.
 439. F-ino P. E. Cork, London, Anglujo.
 440. F-ino C. Heim, Salorino, Svislando.
 441. E. Spielmann, Bern, Svislando.
 442. S-ino E. Finch, London, Anglujo.
 443. F-ino D. Cooper, Bromley, Anglujo.
 444. A. R. Brett, London, Anglujo.
 445. S-ino A. M. Jayne, Croydon, Anglujo.
 446. F-ino M. H. Jones, Morden, Anglujo.
 447. F-ino A. W. Renison, London, Anglujo.
 448. S-ino K. Thomas, London, Anglujo.
 449. W. Thomas, London, Anglujo.
 450. C. D. Boatman, Westcliff-on-Sea, Angl.
 451. R. A. Boaman, Westcliff-on-Sea, Angl.
 452. A. Exlère, Paris, Francujo.
 453. F-ino K. Hancock, Portslade, Anglujo.
 454. S-ino A. K. Hansen, Svendborg, Danlando.
 455. F-ino R. Fraser, Ilford, Anglujo.
 456. F-ino E. Arnold, Belfast, Irlando.
457. O. T. Nicolaisen, Harstad, Norvegujo.
 458. F-ino J. Hald, Oslo, Norvegujo.
 459. Brazila Federacio Spiritista, Rio de Janeiro, Brazilo.
 460. G. L. Preedy, Reading, Anglujo.
 461. S-ino E. E. Preedy, Reading, Anglujo.
 462. F-ino F. Horncastle, Croydon, Anglujo.
 463. F-ino Beatrice Hoyle, Birkdale, Anglujo.
 464. F-ino Bertha Hoyle, Birkdale, Anglujo.
 465. G. Ballinger, Cheltenham, Anglujo.
 466. R. Söchting, Utrecht, Nederlando.
 467. S-ino T. Söchting, Utrecht, Nederlando.
 468. J. van As, Antwerpen, Belgujo.
 469. B. Mathlener, Rotterdam, Nederlando.
 470. S-ino S. Mathlener, Rotterdam, Nederl.
 471. G. B. Warren, London, Anglujo.
 472. F-ino D. Metcalf, Sunderland, Anglujo.
 473. H. Rusby, Whitley Bay, Anglujo.
 474. M. Du Merton, London, Anglujo.
 475. S-ino B. Du Merton, London, Anglujo.
 476. F-ino H. Belbin, London, Anglujo.
 477. J. Rodger, Burntisland, Skotlando.
 478. F-ino J. Shand, Burntisland, Skotlando.
 479. F-ino E. Anderson, Burntisland, Skotlando.
 480. S-ino M. Witz, Praha, Ĉeĥoslovakujo.
 481. Pastro D. W. Robson, Chesterfield, Angl.
 482. R. W. Hamilton, Hemsworth, Anglujo.
 483. F-ino E. M. Pearson, York, Anglujo.
 484. F-ino E. Angrave, Southend-on-Sea, Angl.
 485. F-ino G. Chambers, Westcliff-on-Sea, A.
 486. F-ino M. Hall, Westcliff-on-Sea, Angl.
 487. A. J. Shaw, Southend-on-Sea, Anglujo.
 488. S-ino J. M. Shaw, Southend-on-Sea, An.
 489. F. H. Messer, Oxford, Anglujo.
 490. F-ino P. M. G. Chaundy, Oxford, Anglujo.
 491. S-ino H. E. Smith, Oxford, Anglujo.
 492. F-ino L. Wildman, Oxford, Anglujo.
 493. A. W. Young, London, Anglujo.
 494. F-ino E. Cheeseman, London, Anglujo.
 495. P. K. Cocks, Croydon, Anglujo.
 496. Prof. B. Beau, Mâcon, Francujo.
 497. G. de Boes, Ronse, Belgujo.
 498. S-ino I. de Boes, Ronse, Belgujo.
 499. F-ino A. E. Smith, Huddersfield, Anglujo.
 500. F-ino I. L. Buchanan, Edinburgh, Skotl.

Ni funebras

— S-ro Prof. D-ro ALBERT SCHRAMM mortis 57-jara la 25.10.1937 en Tübingen, Germanujo. Li estis la scienca gvidinto de la Internacia Ekspozicio por Libroindustrio kaj Grafiko (« Bugra ») en Leipzig 1914, estro de la Germana Akademio por Bibliotekistoj en Leipzig, kaj ĝenerale li estis kapabla organizanto, administranto kaj scienca verkisto. Kiel esperantisto li kreis la Saksan Esperanto-Instituton (kiu fariĝis poste la Esperanto-Instituto por la Germana Regno). Li estis redaktoro de la ilustrita revuo « La Bela Mondo », poste de « Rund um die Welt ». Li verkis lernolibrojn, faris paroladojn, fondis grupojn ktp. Li estis ankaŭ vicprezidanto de la 4-a Universala Kongreso en Dresden. — Honoron al lia memoro!

— S-ino José VERMANDERE-VAN CAENEGHEM, edzino de s-ro Gustave Vermandere, delegito de IEL en Antwerpen, Belgujo, administranto de la Reĝa Antverpena Esperanto-grupo « La Verda Stelo », kaj prezidinto de Belga Esperanto-Instituto, mortis subite la 8.12.1937 antaŭtagmeze. La antaŭan vesperon ŝi ankoraŭ ĉeestis feston, kaj nenio antaŭvidigis tiel rapidan progreson de ŝia malsano. — Nian koran kunsenton al la funebranta edzo kaj al la ceteraj familianoj!

— S-ro HENRY WRIGHT FISHER mortis post longa malsano en Asheville, N.C., Usono, la 7.10.1937. La usona esperantistaro perdis en li multjaran laborinton por la movado. Li ripozu en paco!

membroj ricevas jarlibron (konsistanta estas eldonitaj tiaj turistbroŝuroj pri Stockholm, Lappland, Upsala, Visby kaj Vermlando.


Se montriĝas malfacilaĵoj en iu lando fondi specialan turisman Esperanto-asociacion, mi insiste proponas, ke la landa asocio komisiu al kelkaj personoj starigi Esperantan Turistan Komisionon. Kion do faru tiu ETK? Jen:

ETK unue esploru la eblecojn aranĝi grupvojaĝojn al iu najbara lando. Oni serioze interrilatu kun diversaj ŝip- kaj fervojasocioj por ricevi rabatojn. Post tio ETK pretigu detalan vojaĝprogramon por certa tempo, ekz. por 3-taga aŭ 8-taga ekskurso. Oni ankaŭ devas akurate informiĝi pri la precizaj forirkaj revenhoroj. Kaj koncerne la prezon de la vojaĝo mi proponas, ke ĝi enhavu ne nur vojaĝbiletojn sed ankaŭ ĉiujn elspezojn por loĝo, manĝo, gvidado kaj trinkmono. Mi antaŭvidas, ke oni faros grupvojaĝon al iu eksterlanda loko, kie troviĝas esperantistoj. Oni nature do devas interrilati kun tiuj esperantistoj por ricevi ilian helpon. Ankoraŭ mankas iu regulo pri tiu turisma servo; sed mi proponas, ke ĉiu vojaĝ-grupo, kiam temas pri tuttaga gvidado, pagu al la gvidanto ekz. 1 kronon (= 1 angla ŝilingo) por ĉiu vizitanto, tamen potage maksimume 20 kronojn. Oni nature ankaŭ povas fari specialajn interkonsentojn.

Por ke vi ricevu la plej klaran bildon pri la labormetodo, mi nun ripetas la plej ĉefajn punktojn el cirkulero, kiun la sveda ETK en *januaro 1937* dissendis al siaj lokaj reprezentantoj kaj al la diversaj Esperanto-kluboj de Svedlando. Jen la teksto :

« Per tio ĉi mi proponas al via klubo dum la venonta somero aranĝi grupvojaĝon al Estonio. Ĉiuj detaloj prizorgotaj rilate al tiu vojaĝo estas pretigitaj de E.T.K., sed por atingi la plej grandan reklamon por via klubo, la vojaĝo okazu en la nomo de via klubo. »

« Rigardu! Se vi opinias, ke via klubo estas tro malforta por mem funkcii kiel vojaĝ-aranĝanto, tiam turnu vin al via loka gazeto kun la propono, ke la vojaĝo okazu sub la titolo: « La somera turistvojaĝo de-gazeto kaj la Esperanto-klubo ». Estas memkompreneble, ke la gazeto tiam devas transpreni la respondecon kaj kostojn por la reklamanoncoj kaj reklam-artikoloj. La klubo akceptas la aliĝojn kaj zorgas pri la efektiviĝo de la vojaĝo (pere de E.T.K.). Tiel — oni klarigu al la gazeto — kaj la gazeto kaj la klubo ambaŭ faras oferon kaj elspezas por la vojaĝo, kaj ambaŭ ricevos moralan gajnon kaj reklamon. »



Esperanto instruata en granda oceanŝipego.

La bildo montras nian samideanon, Prof. Agostino Stellacci, ĉe la nigra tabulo. Li estas instruanta Esperanton al la ŝipanoj kaj pasaĝeroj de « Conto Grande », laŭ la Cseh-metodo. (Foto Ciotti.)

« Temas pri: 8-taga dumlibertempa vojaĝo al Estonio. Foriro de via urbo per trajno sabate la 19 junio je 8 h. Reveno al via urbo dimanĉe la 28 junio je 17 h. Kosto: kr. 81.—, en kiu sumo estas enkalkulitaj ĉiuj elspezoj por fervoj- kaj ŝipbiletoj en la 3-a klaso, loĝo, manĝo gvidado kaj trinkmono. »

« Aliĝoj por partopreno estas akceptataj ĝis 1 majo. Samtempe estas enpagota la aliĝsumo de 5.— kr. Plej malfrue la 1 junio ensendu la restsumon de la biletprezco. »

« Rimarku, ke la vojaĝo estas aranĝata ne nur por esperantistoj sed speciale por la ĝenerala publiko. Klarigu al la ne-esperantistoj, ke ni aranĝas tiun vojaĝon por montri la eblecojn de Esperanto servi en turismo. Kaj se necese klarigu, ke dum la tuta vojaĝo oni per neniu vorto faros Esperanto-propagandon inter la turistoj. (Inter ni ni tamen konfesu tute sincere, ke ĝuste la fakto, ke la tuta vopaĝo okazas per Esperanto, kaj ke tiu lingvo estas uzata de la turistgvidantoj, estas la plej elokventa reklam-parolado! La spertoj dum pluraj jaroj montras, ke la nun skizita labormaniero havigis al nia movado tre multajn adeptojn kaj fidelajn amikojn.) »

« Ni petas, ke vi tuj traktu tiun ĉi proponon en via klubkunsido. Ĉiu esperantisto komprenas, ke ĝuste tia turistvojaĝo, kian ni tie ĉi skizis, kaj kiu turnas sin al la ĝenerala publiko, estas tiel grava por la Esperantomovado entute, ke vi certe faros ĉion por realigi nian proponon. »

Tiu ĉi cirkulero estis sendata al 30

lokaj Esperanto-kluboj. El ili 5 kluboj decidis efektiviĝi la proponon. 140 kontentaj personoj partoprenis la grupvojaĝojn kaj entuziasme decidis aŭ komenci la studon de Esperanto aŭ daŭrigi la Esperanto-studadon en la venonta studsezono.

Ĉu oni povas imagi iun pli bonan rezulton?

Mi ĵus diris, ke la cirkuleroj estis senditaj al 30 lokoj, sed nur 5 lokoj efektivigis la proponon. Per tio mi celas montri, ke oni ne pretendu miraklojn. Sed oni estu kontenta kun eĉ la plej malgranda sukceseto. Ĝuste *multaj sukcesetoj* iom post iom povas sumiĝi je *sukcesego!*

Do, provu en ĉiu lando fondi E.T.K. Tiel vi servos la enlandajn esperantistojn same kiel la eksterlandajn. Kaj fine vi konsiderinde plifortigos la reputacion de Esperanto en la okuloj de la ĝenerala publiko. (Daŭrigota.)

Esperanton en Lernejon!

Nederlanda politika partio traktos pri enkonduko de Esperanto en elementajn lernejojn.

En sia jarkunveno, la 27.11., la nederlanda politika partio « De Vrijzinnig-Democratische Bond » (Liber-Demokrata Ligo) decidis, meti sur la tagordon por la venonta jarkunveno la proponon de la federacio Zeeland « enkonduki Esperanton kiel nedevigan fakon en la programon de la elementa lernejo por la 7-a klaso ». Post unu jaro tiu temo do estos diskutata de multaj eminentaj personoj, inter kiuj, krom kelkaj parlamentanoj kaj senatanoj, ankaŭ estas du eksministroj.

Esperanto vivas

ĈEĤOSLOVAKIO.

Konata samideano, s-ro Krysta, fariĝis 60-jara.

La 12.12. okazis en Mor. Ostrava laborkunveno de Regiona Esp. Ligo. Salutis kaj bonvenigis s-ro Slany. Okaze de la 60-a naskiĝotago de s-ro Lud. Krysta, prez. de REL, la vicprez. s-ro Poncza bondeziris la jubileulon, memorigante pri liaj grandaj laboro, oferemo kaj meritoj en la Esperanto-movado, kaj transdonis al li diplomon pri honora membreco de REL. Poste multaj personoj gratulis kaj manpremis la jubileulon. En la fino s-ro Seppik, estono, pliriĉigis la programon per mallonga prelego pri la vivo de D-ro Zamenhof; li donis ankaŭ kelkajn bonajn sugestojn por nia plua laboro, ne evitante kritikon kiu eble estis iom tro akra.

Dunacia kunveno en Gablonz.

Germana Esp.-grupo « Izermontaro » aranĝis interkonsente kun la ĉefaj gesamideanoj de rorda kaj orienta Bohemia amikan ambaŭnacion kunvenon en Gablonz, la centro de mondkonata ornamajindustrio. Kunvenis pli ol 40 p. Post komuna rigardo de la urbo oni tagmanĝis en la loka grupejo « Bastei » kaj poste ekskursis al monto Bramberg en Izermontaro. En la montgastejo raportis s-ano Gahler pri la Jubilea Kongreso. En nia lando Esperanto estas fakte jam bezonaĵo inter la du landaj nacioj ĉefa kaj sudetgermana. Sekvonta kunveno ree okazos en ĉefa regiono apud Turnov.

DANLANDO.

Rondvojaĝo de s-ro Krestanov.

Kvankam estas « io putra en Danlando », pro du partioj de danaj esperantistoj (oni skribas al ni), nia bulgara samideano Ivan H. Krestanov sukcesis fari bonan propagandvojaĝon tra la tuta lando. Dum tri semajnoj li vizitis la jenajn lokojn: Köbenhavn, Haslev, Karise, Vordingborg, Naestved, Slagelse, Korsör, Nyborg, Odense, Sönderborg, Esbjerg, Ringköbing, Ulfborg, Holstebro, Viborg, Aalborg, Aarhus, Fredericia, Kalundborg, Holbaek, Helsingör, Nyköbing, Randers, Langa, Frederikshavn kaj Silkeborg. En la pli multaj lokoj li vizitis la lokajn redakciojn kaj faris senpagajn paroladojn pri « Bulgarujo, la lando de l' rozoj kaj centjuroloj ». La gazetoj donis longajn intervjuojn kaj raportojn ofte kun la portreto de s-ro Kr. kaj bildoj el Bulgarujo. Nia samideano enŝipiĝis la 27.11.1937 al Islando, kie li finas sian eŭropan vojaĝon kaj ankaŭ novan verkon « Tra Eŭropo per Esperanto » (ĉ. 300 paĝoj kun multaj ilustraĵoj), kiu aperos en 1938.

EGIPTUJO.

Paroladoj de s-ro Zscheile; kursoj.

S-ro N. Mahrus, del. de IEL en Fajum, raportas: Nia fervora samideano Edmund Zscheile, konata germana mondpiedvojaĝanto, faris esperantlingvan publikan paroladon, kiu estis tradukata arablingven, pri sia vojaĝo tra la mondo. La parolado estis ilustrita per belaj lumbildoj. Ĉiuj lernejoj fervore akceptis la prelegon kaj sendis amason da lernantoj kun iliaj instruistoj. La parolado ankaŭ faris bonan propagandon por nia movado; ĝi tiel sukcesis, ke oni aranĝis ĝin ankaŭ en aliaj lokoj. — La kursoj en Kairo kaj Fajum jam komenciĝis. Ili havas ne multajn sed tre entuziasmajn lernantojn.

FINNLANDO.

Bontemplanoj kaj Esperanto.

La organo de l' finnaj bontemplanoj « Raittiuskerho » ekde decembro havas ampleksan Esperanto-fakon. Finna grandloĝio de bontemplanoj, kiu ĵus aranĝas mondkongreson de ĉiulandaj bontemplanoj, sendos sian alvokon al

ĉiuj landoj ankaŭ en Esperanto kaj jam proponis al la internacia, supera grandloĝio de IOGT la enkondukon de nia lingvo ĉe la nomita mondkongreso en Helsinko aŭtune 1939. Malfermiĝos tra la tuta lando studrondoj de bontemplanoj pri Esperanto. — Kristana Esp.-Asocio de Finnlando eldonis flugfoliojn. — En presado estas broŝuro de « Dekses aktualaj kialoj por rapida enkonduko de la internacia helplingvo Esperanto » (finlingva). — Gvidfolio de la Esp.-societo de Uusikaupunki pro granda interesiĝo jam elĉerpiĝis. — Novaj kursoj komenciĝis en Uusikaupunki, Hiu kaj Kalanti.

HUNGARUJO.

Prelegvojaĝo de Kola Ajayi.

« Lit. Mondo » aranĝis prelegvojaĝon de nia negra samideano Kola Ajayi, kun granda sukceso, en jenaj lokoj: Békés (ĉ. 200 p.), Budapest (en katolika junulara societo 200, en tipografista societo 450, ERA 80), Debrecen (700), Hódmezövásárhely (400), Kispest (80), Pécs (300), Szeged (trifoje, sume 500), Ujpest (100), Vác (250). La plej granda sukceso (pri ĝi ni jam raportis) estis en Kalocsa, kie tri prezentadoj okazis antaŭ 1500 personoj, kaj 400 interesiĝis tuj pri Esp.-kursoj. Ĉie ankaŭ gazetoj skribis pri lia interesa parolado, kiun aliaj samideanoj interpretis.

La 14.11. estis en Katolika Esp.-Societo de Budapeŝto te-vespero kun amuza programo (pli ol 100 personoj); parolis D-ro F. Erdey kaj S. Ciora. — La 21.11. parolis D-ro Erdey en la Nacia (Esp.-) Societo pri la enkonduko de Esperanto en la lernejojn; domaĝe ke liajn trafikajn argumentojn aŭskultis ĉefe esperantistoj (ĉeestis 50 p.). En nomo de HEF, Esp. pedagogia societo kaj katolika societo alparolis s-roj Mihalik, Wagner kaj Marczell. F-ino Bodnár transdonis proponon.

JUGOSLAVIO.

Oni preparas la 20-an Kongreson de IKUE.

La jubilea mondkongreso de la katolikoj okazos la 23.-28.7.1938 en Ljubljana. Dum la kongreso okazos: artekspozicio, internacia foiro de poŝtmarkoj, Esp.-ekspozicio, plej diversaj ekskursoj. Gravaj rabatoj! Ĉiujn informojn donas: Damjan Vahen, LKK-sekretario, Reslova 29, Ljubljana, Jugoslavio. (Al informpetoj aldonu respondkuponon!)

MALAJIO.

« L'Oazo » pionire agas en Malajio.

Dank' al la helpo de la redakcio de ĉina « Matena Poŝto » en Ipoh, oni sukcese kreis antaŭ unu jaro (t.e. en aprilo 1936) la solaran propagandilon pri Esperanto per ĉina lingvo en Brita Malaja Duoninsulo, « L'Oazo », redaktata de s-ano Lu-Sue Yong, 38, Brickfields Road, Kuala Lumpur, Fed. Malajio-Ŝtatoj. Kvankam ĝi aperas monate en la ĉiutaga gazeto, oni ĉiam atendas ĝin entuziasme.

Antaŭ kelkaj jaroj oni tute ne komprenis ĉi tie nian lingvon. Sed venis al tiu ĉi lando nia ĉina pioniro s-ro Houchio, kiu komencis Esperanto-kurson en ĉina lernejo en Ipoh. En aŭgusto ĉijare oni fondis kurson en Kuala Lumpur, kiun ankaŭ gvidas s-ro Houchio. Tamen ĝis nun oni ne povas diri, ke nia movado estas tre vigla en Malajio.

La manko de mono, la senlaboreco kaj la malfacileco de internaciaj rilatoj estas kaŭzoj de tiu malvigleco. Entuziasmaj esperantistoj de la mondo, ni esperas ke vi helpos nin kaj sendos al ni utilajn sciigojn por nia « L'Oazo »! Specimenan numeron oni ricevos senpage.

NORVEGUJO.

Kursoj kaj granda intereso por Esperanto en lando de noktmeza suno.

Post kurso de s-ro O.T. Nicolaisen en Molde fondiĝis klubo kun 15 anoj. La 6.10. li faris paroladon pri Esperanto en junlarklubo; tuj 15 membroj komencis studi la lingvon sub gvido de lektoro Deseve. De Molde s-ro Nicolaisen vojaĝis al Narvik, kie li komencis gvidi 4 kursojn kun 94 p.: estas 2-kursoj por komencantoj, unu por 45 infanoj kaj unu daŭriga kurso. La Esp.-klubo dissendis 500 flugfoliojn kaj 20000 broŝurojn pri la kursoj kaj aranĝis Esp.-ekspozicion en vendejo ĉe la ĉefstrato. — La 28.10. s-ro N. faris paroladon pri Esp., provlecionon kaj lumbildparoladon pri sia biciklado tra 12 landoj; li ankaŭ prelegis pri Esp. antaŭ la mikrofono de « Narvik kringkaster » la tagon antaŭ la provleciono. Nun Narvik ekhavas Esperantan hotelon (« Hotell Royal »); la kursoj finiĝos per festo la 11.12.

Entute s-ro Nicolaisen gvidis ĝis nun 37 kursojn por 812 komencantoj kaj faris prelegojn pri Esperanto por 5600 aŭskultantoj. Krome li vendis Esp.-literaturon ktp. por pli ol 4500 novis. kronoj. Gratulon kaj daŭrigon sammezuran!

POLUJO.

Esperanto-kurso ĉe Popola Universitato.

Pro iniciato de s-ro L. Krysta, la Pola Popola Universitato, sekcio Cieszyn, krom kvar aliaj aranĝis ankaŭ Esperanto-kurson, kiun gvidas s-ro Krysta. Anoncis sin 112 partoprenantoj. Ĝi okazas en du partoj laŭ la Cseh-metodo. La kurso abonis Heroldon.

USONO.

Oni laboras kaj festas en New York.

Post eksiĝo de Pastro Smith, la Esp.-klubo « Harmonio » elektis kiel prezidanton s-roon Ludoviko Dormont, lernejestron, kiu dediĉas sian sperton kaj tempon al nia idealo, instruante Esperanton al komencantoj. « Harmonio » kaj la Laborista Asocio kune aranĝis balon la 27.11. Spite al pluvo ĝi estis socia kaj financa sukceso. S-ro James Sayers faris mallongan prelegon pri Esperanto por la neesp. ĉeestantoj, kaj tiam prezentis nian tre estimatan filinon de la majstro, Lidja Zamenhof, kiu faris belegan esperantlingvan paroladon.

La Esp.-Societo de New York kaj la Esp.-Societo de Brooklyn kunvenas regule almenaŭ unufoje ĉiumonate. Dufoje monate kunvenas Studenta Esp.-Asocio de New York, kiu enhavas en sia membraro studentojn de diversaj mezlernejoj kaj kolegioj de la urbo. La Esp.-Klubo de la Kolegio de Brooklyn kunvenas ĉiumarde en la lernejo je la unua horo ptm.; la membraro konstante kreskas. En la lasta kunveno, unu el la membroj, Doris Tappan, pri-skribis siajn spertojn rilate al Esperanto, kiel membro de la Esp.-karavano de usonaj esperantistoj, kiu travojaĝis Eŭropon kaj vizitis la U.K. en Varsovio.

La kontraŭuloj asertas

ke Esperanto estas kontraŭ la principoj de tio aŭ tio, kaj eĉ malpermesas ĝian propagandon. Kion oni malpermesas, tion oni timas. Kion oni timas, tio devas esti forto. Sed se Esperanto, laŭ la opinio de la kontraŭuloj, jam estas forto, ni ne bezonas timi pri ĝia estonteco, kaj ĝia malpermeso nur povas instigi la tutmondan esperantistaron multobligi sian streĉon por ĝi kaj labori por ĝi des pli energie.

La Esperanto-Literaturo kreskas

D-ro inĝ. Eugen Wüster: Konturoj de la lingvo-normigo en la tekniko. El la germana originalo esperantigis D-ro Emil Pfeffer. — Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝto, 1936. — Formato 14x20 cm. — Broŝurita 1,25, bindita 1,80 guld. Havebla ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen.

Ĉi tiu libro estas malgrandigita kaj parte kompletigita eldono de la granda germanlingva verko de Wüster kun la (esperantigita) titolo: Internacia lingvo-normigo en la tekniko, precipe en la elektrotekniko (La nacia lingvo-normigo kaj ĝia generaligo). Tiu granda impona eldonaĵo, kiu vekis en multaj rondoj sciencaj kaj teknikaj gravan kaj sonoran eĥon, sisteme ankaŭ en „Heroldo de Esperanto“ estis priparolita. Supozeble por plialproksimigi sian laboraĵon ankaŭ al ne-germanlingvaj interesitaĵoj kaj al pli vasta rondo ol estas la pure teknika, Wüster aperigis ĉi tiun esperantlingvan eldonon. Kvankam ĝi ampleksas proksimume nur 1/6 de la originala verko kaj tial devas enteni multon en formo tre koncizigita, aŭ tute devas forlasi, ĝi tamen plene trafas sian celon: doni senmankan superrigardon pri la tuta stato de la demando.

Laiko ne tute facile legos ĉi tiun verkon, kiu estas severe science skribita kaj pro tio necesigas ne nur legadon sed profundan studadon, precipe kiam la materio estas al oni plimalpli nekognata. Sed tiamaniere ĝin tralaborinte, oni kun ĉiam pliiĝanta intereso sekvas al la klera kaj koncize-trafa prezento de l' problemoj. Esperantiston, kiu ne samtempe estas ankaŭ teknika fakulo, speciale interesos la ĉapitroj pri la planlingvoj, inter kiuj Esperanto okupas la laŭmeritan lokon. Ĝojigos ĉiun la konstato, ke Wüster, prijuĝante la aferon laŭ ĉiuj flankoj, konsideras Esperanton kiel tutplene taŭgan internacian helplingvon por la internacia lingvo-normigo en la tekniko. Per tabelo li impresive vidigas, ke per la alprenado de Esperanto (apud la angla kaj kiel legolingvo) oni ŝparus tuj post ĝia enkonduko proksimume 50 % de la laboro, ne perdante la aliron al la angla literaturo.

Nur pri unu (lingva) punkto tiu kaj tiu, kiel ankaŭ la recenzinto, malkonsentos kun Wüster. Sur paĝo 102 supre li diras ke « la nebelaj pluralfinajoj de l'Esperanta adjektivo (-aj, -ajn) kaj la nebelaj kaj facile intermikseblaj tabelvortoj (kiuj, ĉiujn) estas en ldo forigitaj ». Nu, ne la ĉi tie eldirita komparo favora al ldo min surprizis, sed la Wüster'a opinio pri la nebel-eco de -aj, -ajn. Ne volante altiri la malnovgrekan lingvon mi tamen devas pensi, ke en la supozeble gepatra lingvo de Wüster ĝuste tiuj ĉi sonoj abundas, tre ofte eĉ en akcentita formo (ekz. *Keilerei, eine Gemeinheit*). Kaj pri la tabelvortoj ŝajnas al mi, ke ili, eble ĝuste pro sia iom stranga formo, estas tuj rekoneblaj kaj okule kaj orele, certe multe pli ol similaj vortoj en pluraj lingvoj romanidaj. Sed ĉi tio estas konsiderinda kiel privata opinio de l' aŭtoro, kiu tuj-sekve juste konfesas, ke tiaj plibonigoj de ldo estas pagitaj per samtempaj malbonigoj.

En la libro troviĝas multaj tabeloj, diagramoj kaj statistikaj desegnoj por grafike esprimi ion alie ne tiel senpere prezenteban. Mi volas ĉi tie atentigi nur pri la aldonita aparta tabelo demonstranta, kiel nomoj de korpaj partoj estas uzataj por maŝinelementoj.

Seriozaj esperantistoj, jen libro por vi!

B. K.

XXXIV-a Eŭkaristia Mondkongreso dum majoj, 1938, Budapeŝto. — Bone presita, en violkoloro, kaj ilustrita faldprospekto en Esperanto. Petu ĝin, kaj informojn pri la Kongreso, de: Subkomitato de Eŭkaristia Mondkongreso, Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo, Budapeŝto IV, Petöfi Sándor-utca 9.1.3.

Emba: Maria kaj la Grupo. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝto, 1936. Formato 19x13 cm, 172 paĝoj. — Prezo broŝurite 1,50, bindite 2 guld. Havebla ĉe Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen.

Hura! Vere esperantista romano, romano el nia propra sfero, eĉ el nia intima medio: el la interna grupvivo. La kadro de la ĉefokazaĵoj estas tute malvasta; la aŭtoro de ĉi tiu originala romano firme sin tenas al la mem fiksitaj limoj. Tiamaniere ni vidas antaŭ ni kiel sub pligrandiga lenso la mikrokosmon de iu grupo, kaj eĉ nur certan periodon el ĝia vivo, sed ja periodon indan de tiel lerta, vigla kaj impresa priskribo kiam Emba al ni prezentas. Temas pri speco de batalo inter la « ĉambrego », la granda plimulto de la anaro — « bonan-vesperon-esperantisto » — kaj la « gazetvermoj », t.e. la studemuloj kaj seriozaj mondlingvanoj. La gvidantaro, speciale la prezidanto, kies paroladoj superfluas de gramatikaj eraroj, montras sin mizere nekapabla majstri la situacion kaj porbene eluzi la talentojn de l' ĉambrego por movadaj celoj, kaj tial neeviteble la plimulto uzurpas — sur leĝe balota vojo, antaŭpreparita per personaj intrigoj — la potencon; el la grupo formiĝas teatra, amuza, spektakla klubo, ĝis kiam venas la katastrofo. Kia? Tion mi ne perdis ĉi tie.

Sed la titolo de l' romano ja tekstas: **Maria kaj la Grupo.** Ĝuste ĉi tiu virino — grava kaj tamen tute malgrava persono en la grupo — donas al la romano ĝian dignon, ĝian moralan forton. Pli kaj pli ŝi elreliefiĝas, korduŝa figuro de « nekognata esperantisto ». Fervoro, humilo kaj oferemo estas de ŝi ne predikataj, sed ekzemplodone vivataj, ŝi vere estas homo « nobla, helpema kaj bona ». Nur tia homo povas diri: « ... kiu jam vere fariĝis esperantisto, tiu restos esperantisto ĝis la morto, kaj ĉiu vera esperantisto volonte laboras por la movado ». Montrante novan libron: « Jen nova kolono por subteni Esperanton. Lingvo, kiun parolas granda popolo, povas neniiĝi plene, sed lingvo, kiu havas fortan literaturon, vivos eterne. »

Emba, nova bravulo sur la kampo de l' originala Esperanto-literaturo, kvankam jam kognata novelisto de la laborista movado, kiel diras al ni J. Baghy en la Antaŭparolo, je la fino de sia tiel simpatie verkita « hejm »-romano el Esperantujo ne povas (aŭ ne volas) preterlasi la okazon iel malaltenigi la tiel nomatan « neŭtralan » movadon. La laborista movado aperas kiel la vere serioza standardoportanto de la movado mondlingva. « Ĉi tie estas seriozaj homoj kiuj serioze konsideras la movadon. Tiu opinio estas kaj estis jam tiel ofte distruptetita de tiu « partia » flanko, ke multaj bravaj « neŭtraluloj » ĝin preskaŭ mem jam kredas. Sed ĉu ni vere bezonas partian apogon por la Esperantismo? Certe ne! Ecerbigu ĉiu objektiva samcelano la dikpresitajn frazojn el « Heroldo de Esperanto » n-ro 40, 2-a paĝo, 1-a kolono, kaj se li havas koron kaj sentopovon, li povos kompreni, ke tia percepto de nia celado povas daŭre nin entuziasmigi sen la lambastono de iu alia ismo. Kaj tian puran idealismon havis Maria, kaj laŭ ĝi ŝi agadis. Trovu ŝi multajn imitantojn!

B. K.

Esperanto-limonado, Esperanto-vino, Esperanto-likvoro. — Ni ricevis tri etiketojn, presitajn en koloroj verda kaj nigra, kaj en lingvoj nederlanda kaj Esperanto, pri trinkaĵoj kun la diritaj Esperanto-nomoj. Laŭdire « tiuj ĉi trinkaĵoj estas verdkoloraj kaj havas agrablan guston » (ni ne povis kontroli), kaj ili estas trinkaĵoj « por sinjoroj same kiel por sinjorinoj ». La trinkaĵojn kun la Esperanto-etiketo liveras P.M.M. Remmen, vinkomercisto, Heuvel, en Gemert, Nederlando.

H. W. van Loon, Rigardu la Teron! Tradukis el la angla George Saville; eld. lit. Mondo, Budapeŝto 1936, 454 paĝoj. Prezo, inkl. sendkostoj, broŝ. 5,50; bind. 6,25 guld.; ĉe: Heroldo de Esperanto, Scheveningen, Nederlando.

Dika libro, kies enhavon oni devas unue iom pripensi, antaŭ ol skribi pri ĝi. Almenaŭ se oni — kiel la recenzanto — ne estas fakisto ĉi tie.

Enormaj ciferoj, grandegaj nombroj, mirindigaj rakontoj.

Oni povas nomi ĉi tiun libron geografia libro, sed tiam oni limigas la lokon de la verko. Ĝi estas pli, ĝi ne apartenas al speciala fakado de scienco. Resumi la enhavon ankaŭ ne estas eble. Kion do mi faru?

1. Rekomendi la aĉeton de ĉi tiu libro.
2. Rekomendi la legadon de ĉi tiu libro.
3. Rekomendi la pripenson de la enhavo de ĉi tiu libro.

4. Rekomendi sanan menson por ne kredi ĉion (ĉar la libro enhavas multajn aferojn kiuj estas kontradiktaj).

5. Rekomendi al la eldonistoj publikigi pli multe da tiaj verkoj anstataŭ broŝuroj.

Joh. Hartog.

30a Universala Kongreso de Esperanto, 30 Julio — 6 Aŭgusto, 1938. La oficiala kongresafiŝo, 76x50,5 cm. Havebla por unu respondokuponon de Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Simpla sed bela afiŝo en fotopreso. Ĝi montras parton de la parlamentejo kun la turo « Big Ben ». La supre citita teksto estas surpresita per verda koloro.

Jesus Amaya: Mejiko kaj Kardenas. 115 p. 14,5x19 cm. Eldonis: Editorial Lumen, Mejiko, Meksiko. Prezo ne indikita.

La aŭtoro nomas sian libron « Kritiko Socio-Politika de la Pasinta kaj Nuntempa Meksika Vivo ». Meksiko, lando sub varma suno, lando de vasta rasmikso, kie la mestizo formas la plimulton de la popolo, kaj lando de pasia politika agitado, — tia ni imagis ĝin, tia ĝin konfirmas al ni ankaŭ la libro de nia samideano Jesus Amaya. Ĝiaj ŝtatprezidantoj kutime estis antaŭaj generaloj, fariĝintaj gvidantoj de sukcesaj revolucioj, kaj ofte ili finis sian vivon per la ponardo aŭ pistolo de la kontraŭuloj.

En la libro ni renkontas nomojn, kiuj ekscitis la fantazion de nia junaĝo: Moktesuma, Cortez, Maksimiliano, Diaz, — kaj aliajn nemojn kiujn priskribis al ni la eŭropa gazetar kiel bravajn heroojn, aŭ eĉ kiel duonsovaĝajn bandestrojn: Madero, Carranza, Villa, Obregon, neniu el kiuj mortis nature sed ĉiuj pereis de murdista mano.

Estas mirige, ke en tiaj cirkonstancoj ankorau iu ajn kuraĝas suriri la orumitan seĝon de l' ŝtatprezidanto de Meksiklando, ĉar li povas esti preskaŭ certa, ke la sorto, kuŝi en sia propra sango, iutage trafos ankaŭ lin; tamen aspiro al potenco kaj influo restas pli forta eĉ ol timo al tro frua morto. Sed eble Cardenas, la nuna prezidanto, sukcesos eviti tiun fatalon.

Estas malfacile por eŭropano, juĝi pri meksikaj cirkonstancoj. Mi esperas ke prezidanto Cardenas sukcesos feliĉigi sian landon kaj popolon.

La legado de la libro prezentiĝas kelkfoje preskaŭ sama problemoj kiel la gvidado de tia ŝtato kia estas Meksiko. La lingvaĵo estas plena de hispanismoj kaj gramatikaj eraroj. Tio ne devus esti. M.

Mundart — Hochdeutsch-Esperanto estas la ĉefvortoj de afiŝego (63x96 cm), kun konvinkaj argumentoj, presita graslitere. Ĝi estas bonega propagandilo en ĉiuj germanlingvaj regionoj. Prezo unu resp.-kuponon de Bruno Gahler. Talstr., 3, III, Gablonz, Ĉeĥoslovakio.

Ĉu Estontecmuziko ?

Fragmento el «Tat Tvam Asi»,
de D-ro Nico Van Suchtelen.

Promenado kun Tine, Lydia, Bourdin kaj Borinsky al la romana kastelo. Interparolado pri mondlingvoj. Ili ĉiuj multe ŝatus unu lingvon, sed tiam ĝi estu ne « artefarita », ne Esperanto aŭ io simila.

— Jes, kio do?

La plej bela « natura » lingvo.

— Prave, la franca, Bourdin diris.

— Feliĉe ke *Herr Oberlehrer* ne ĉeestas por postuli la monopolon por la germana, Borinsky rimarkigis.

Mi emis iom inciti la bonan Bourdin pro liaj strangaj konceptoj pri « bela » kaj « natura ».

— Nu, legu poeziaĵojn en la provencala, aŭ la alparoladon de Ludoviko la Germana, kiu ĵus tiun ĉi matenon venis sub miajn okulojn. Tiun li faris en Strasburgo, *anno* okcenta-kaj-tioma en la « lingua romana ». Kia barbara, degenerinta latina ! Kaj la moderna franca fakte nenio alia estas ol tiu sama fuŝlingvaĵo, sole en pli alta grado.

— Ne gravas, Bourdin protestis, tiu fuŝiĝo ĉiaokaze estas natura kaj bela, elflorinta el la popolanimo!

— Kaj kion vi diras pri la lingvaĵaĉoj, la komerca jargono, fuŝkunigita per kripligitaj vortoj el dekduo da lingvoj, kiel ĝi estas kreata en iuj regionoj de Sudeŭropo aŭ en centra Afriko, aŭ en la ĉinaj havenoj, de via laŭdegata lingvofaranta geularo? Ankaŭ tia *galimatio* « nature ekfloris ». Eble tre bela, sed ĝi sonas pli ridinde ol la artefarita fuŝlingvaĵo de Zamenhof.

— Do vi volas aserti, ke ne ekzistas belaj lingvoj? Nu, kaj la greka?

— Demandu tion al nefakulo sed ne al Homero-maniulo kiel mi. Ĉiu honesta nefakulo ĝin opinias stranga galimatio kaj tiun impreson faras kiu ajn lingvo, al kies sonoj oni ne kutimiĝis. Cetere ĉiu lingvo estas bela, nome tiel bela kiel ĉiu alia. Vera lingvo-artisto beligas ĉiun lingvon per celtrafa kunlaboro de sono kaj frazkonstruo. La franca kaj la nederlanda povas esti same belaj kiel la greka aŭ la grenlanda aŭ la esperanta. La lingvo de Racine aŭ Verlaine estas pli bela ol tiu de iu greka fuŝpoeto, kaj Sofoklo pli bele parolas ol franca aŭ holanda rimisto. Kaj kial iu Zamenhof aŭ alia lingvisto kaj artisto ne kapablus konstrui, pro sia scio kaj envidpovo, pli belan, pli simplan kaj logikan lingvon ol estas la plej mallerta kaj malkonciza jargono, per kiu la moderna homo klopodas iom sin komprenigi? Ĉu vi iam partoprenis internacian kongreson, kie ĉiu paroladisto estas sekvata, ne komprenata, de dekonado de la ĉeestantoj? Kiel senespere senfruktaj kaj tedaj estas tiaj diskutoj, kiuj neeviteble degeneras je la plej ĝeneralaj banalaĵoj. Mond-

lingvo estas necesa kondiĉo por la estonteco de vere homa socio. Fratoj kiuj ne komprenas unu la aliajn...

— Estontecmuziko!

— Sed venos ja estonteco. De centoj, de miloj da jarcentoj! Laŭ via propra teorio! Ĉu vi ja vere pensas ke en la 250-mila jarcento estos ankoraŭ parolata ĉu france, ĉu angle aŭ ĉine? Tiam tamen jam delonge ekzistos unu sola mondlingvo, « arte » formita en forgesitaj jarcentoj el ĝerman-romanidaj kaj multaj aliaj pralingvoj, sed pli poste, post la kompleta neniigo de la literaturo de tiuj pralingvoj, disvolvinta pro propra vivo je tute « natura » homa lingvo. Tial lernigu al la junularo Esperanton, lingvon kiu nun komencas vivi kaj prezentas ankoraŭ ĉiajn eblojn, anstataŭ la greka kaj latina, kiuj estas tute senvivaj.

Tiu antaŭvido ŝajnis iom timigi Lydia'n.

— Mi trovas ĝin tiel senfortiga penso, ŝi diris, ke ĉio devas pereii, ke ne unu postsigno restos pri ĉiu nia pensado kaj farado. Forgesitaj Dante kaj Shelley!...

— Aŭ pli malbone ankoraŭ: tradukita en estontecan galimatio, Bourdin interrompis.

— Sed Lydia, nenio ja pereas; ĉio estas absorbita kaj prilaborita en io

alia. Nur la menso, kiu kreas la aĵojn, estas senmorta, sed ke la aĵoj mem pereas en senĉesa metamorfozo, neniel estas pribedaŭrinde. Bourdin eraras, se li pensas ke Dante aŭ Shelley ne estas bele tradukeblaj en estontecan galimatio; sed se ili ne estus tradukitaj en ĝin, tute certe je tiu tempo ekstarus sufiĉe da Dante'oj kaj Shelley'oj, por ke ili rekte verku en la mondlingvo, kaj almenaŭ tiel bele, kiel iliaj antaŭuloj ĝin faris en la itala kaj angla. Kiam frenezulo distranĉas la Gioconda'n aŭ la Drap ekspertojn, mi ĝin opinias bedaŭrinde; sed ke tiuj samaj pentraĵoj ne plu ekzistos post 2000 aŭ eble eĉ post 1000 jaroj, tio tute ne maltrankviligas min. Ĉi tie ni staras nun antaŭ la ruinoj de la romana kastelo. Estas absolute indiferece al mi, ke nur postrestas de ĝi ĉi tiu paro da muretoj: fakte estas domaĝe, laŭ mi, ke oni ankoraŭ renovigas ilin kaj gardigas ilin de enuiga ekssoldato. Kaj ke restas de miloj da aliaj konstruataj majstroverkoj nur kelkaj rompopecoj, ŝajnas al mi pli konsoliga ol se ni estus kondamnitaj je eterna promenado inter malnovaj konstruaĵoj, kaj se ni estus devigataj fari belvederojn el ĉiuj troaj piramidoj, aŭ magazenojn el dezertaj sunotemploj kaj monaĥejoj, kaj bazarojn el romanaj banejoj aŭ gotikaj katedraloj.

Kun afabla permeso de la aŭtoro tradukiĝis el la nederlanda: Tyneverum.


Prof. Albert de Szent-Györgyi

La honorigo kaj ideologio de la nova hungara Nobel-premiito.

Granda ĝojego estis en Hungarujo, ke la medicinan Nobel-premion oni ĵuĝis al hungara univ. profesoro Albert de Szent-Györgyi, kiu en la universitato de Szeged prelegas kaj, unue en anglaj kaj amerikaj laboratorioj, poste en Szeged, faris tre valorajn malkovrojn rilate la « C » kaj « D » vitaminoj. Li starigis la strukturan bildon de la C-vitamino, kiu estas trovebla en citrono, oranĝo, sed precipe en papriko. Kompreneble oni honoras lin multe en lia patrujo; scienculoj, institutoj, privataj homoj salutas lin. La profesoro estas 44-jara, kaj oni povas ankoraŭ multon atendi de li. Ĝis nun jam tri hungardevenaj scienculoj ricevis la Nobel-premion, sed ili ĉiuj vivis en eksterlando. La premiigo de la hungara profesoro do estas nova rekonado de la kulturlaboro, kiun oni faras en tiu malgranda, ekonomie malforta lando. Multaj gazetoj konigis en la diversaj landoj la vivon kaj laboron de profesoro Szent-Györgyi, sed nin interesos, ke li estas ne nur serioza kaj diligentega scienculo, li ankaŭ estas kredanta, religia kaj homama persono. En sia parolado antaŭ la mikrofono de la Budapesta radio li mo-

deste deklaris, ke lia distingiĝo estas preskaŭ nekredibla, ĉar li faris silentan, sinplan laboron kaj precipe por sia propra sopiro, ne por gloro kaj famo. Li serĉas, kiel ĉiuj veraj esplorantoj, la novajn, nekonatajn verojn kaj deziras alproksimiĝi al la naturo. Li estis vere internacia studento: hungara, germana, nederlanda, angla profesoroj gvidis lian sciencon evoluon. Li ĉie rimarkis, ke la *homoj estas ĉie egale bonaj*. Lia praavo iam subskribis la dokumenton, ke Transilvanio kaj Hungarujo estu unu ŝtato. Li havis krom la hungaraj studentoj disĉiplojn kaj kunlaborantojn anglajn, usonajn, svisajn, hindajn kaj germanajn. Fine li deklaris, ke ĉiu scienca laboro estas vana, se el la rezulto de la scienca progreso oni forĝas la ilojn de la detruo kaj se la fruktoj de ĉiuj esploroj estos neniigitaj en nova mondbrulego. Laŭ Pasteur ankaŭ li kredas, ke en la vivo de la homaro agas sur unu flanko la detruo, milito, malamo, sur la alia la *interkompreniĝo, la progreso, la paco*. De post la historio de la homaro tiu ĉi alia flanko estas sur vojo de fortiĝo kaj fine ĝi devas venki. P. B., Budapest.

Trinidad kaj Tobago



BILDOJ EL TRINIDAD.

Maldekstre : Unu el la aleoj de palmoj, de kiuj ekzistas multaj en la kolonio. Dekstre supre: Kampo de sukerkano. — Dekstre malsupre: Unikaĵo de Trinidad: la Asfalta Lago.

La insuloj Trinidad kaj Tobago estas interesplenaĵoj por la vojaĝantoj, ĉar la historio de ĉi tiu kolonio estas saturita de romantikeco, dum ĝiaj belaj partoj estas tiaj, ke ili altiras vizitantojn el la kvar anguloj de la mondo. La turistoj trovas sur ĉi tiuj insuloj multajn distraĵojn; ripozon kaj amuzon li povas ĝui meze de bela pejzaĝo kaj en klimato nesuperebla. Ĉie regas ĝentileco.

La karaktero de la koloniistoj formiĝis jam en pasintaj tagoj. Kaj kvankam kosmopolita popolo, la Trinidadanoj estas fieraj pri sia sinteco kaj esperplenaĵoj pri la estonteco de sia tropika insulo, tiel pitoreske nomita « Land of the Hummingbird », lando de la kolibro.

Kristoforo Kolumbo, serĉante la kontinenton de Ameriko, en 1498 malkovris la insulojn Trinidad kaj Tobago. Ili estas nun remalkovrataj, precipe dum la vintraj monatoj, de ĝuantoj de libertempo, kiuj serĉas sunbrilon.

Plej sude en Okcidenta Hindujo, Trinidad kaj Tobago distancas dek-unu gradojn de la Ekvatoro, kaj de tie oni povas vidi la kontinenton de Suda Ameriko. Vaporŝipe, Port-of-Spain, la ĉefurbo, distancas malpli ol du semajnojn de Eŭropo kaj Kanado, malpli ol unu semajnon de Usono; oftaj interkomunikaĵoj ekzistas per grandaj kaj bone ekipitaj ŝipoj. Pli rapida transportado estas per aviado: al Port-of-Spain de New York al Buenos Aires, kaj flugservoj funkcias ankaŭ al « Panama Canal Zone ».

La insulo Trinidad havas areon de 1862 kvadrat-mejloj, ĝi estas longa ĉ. 50 kaj larĝa ĉ. 37 mejlojn. Tobago enhavas 116 kvadrat-mejlojn kun longeco de 26 kaj larĝeco de 7,5 mejloj. La kombinita kolonio estas la hejmo de proksimume 430.000 loĝantoj de multaj rasoj. La plimulto devenas de afrikanoj kaj orientaj hindoj, dum la malplimulto enhavas ĉinojn, sirianojn kaj homojn el diversaj landoj de Eŭropo kaj Ameriko. Pri la karibaj indianoj, kiuj estis la loĝantaro tempe de la malkovro, restas nur tradicio. Port-of-Spain estas unu el la plej kosmopolitaj urboj de la mondo, kie oni vere povas diri: « Oriento renkontas Okcidenton », kaj la miksaĵo de tipoj kaj kostumoj prezentas interesan studon.

Tri ĉenoj de bluecaj kaj nebulaj montoj kun

alteco ĝis 3000 futoj troviĝas tra Trinidad; el la suda ĉeno elstaras tri montpintoj, laŭ kiuj Kolumbo nomis la insulon « Trinidad ».

Pli ol duono de la kolonio estas ankoraŭ arbaro, kiun oni rezervas por havi ventorompilon kaj por konservi pluvoŝancon. Estas abundeco de riĉa vegetaĵaro, kiu varias de gigantaj palmoj ĝis delikataj orkideoj kaj etegaj filikoj. Simioj, tigrokatoj, agutioj, cervoj sen kornoj, dikoteloj, dazipoj, didelfoj kaj aliaj specoj de animaloj abundas sur la montoj kaj en la arbaroj, dum akcipitroj, kakatuloj, anasoj, galinagoj, papagoj, sonorilbirdoj, tukanoj kaj aliaj sovaĝaj birdoj enloĝas arbarojn kaj plantejojn. Ne malpli ol dek-ses specoj da juvelsimilaj kolibro ekzistas, kiel ankaŭ multaj aliaj specoj de belaj landbirdoj. Pelikanojn, fregatbirdojn, mevojn ktp. oni povas ĉiam vidi laŭlonge de la marbordo. Aligatorejn kaj anasojn oni povas ĉasi laŭlonge de la Caroni-rivero, unu el la ĉefaj riveroj de la kolonio.

Unikaĵo de Trinidad estas la « Pitch Lake », asfaltlago, kiu situas ĉe Brighton, 57 mejlojn distanco de Port-of-Spain. Ĉiu tiu asfaltlago havas areon de 114 akreoj; ĝi provizas al sinjoro Walter Raleigh materialon por kalfatri siajn ŝipojn, kaj dum la pasinta duonjarcento ĝi havigis al la mondo pli ol 5.000.000 tunojn da asfalto por tegi la vojojn.

La klimato de Trinidad estas saniga kaj egala. La kutima taga temperaturo estas 84 gr. F., kaj nokto 74 gr. F. Maraj ventetoj kompensas pro la sunvarmo, tiel ke la termometro malofte indikas super 90 gr. F. Dum la pluvosezono la kutima pluvofalo estas 64 coloj, sed dum la seka sezono, de januaro ĝis majo, la pluvofalo estas nur 2-3 coloj monate.

La kolonio posedas pli ol 2000 mejlojn da bonaj vojoj por aŭtomobiloj, kaj estas ankaŭ fervojo longa 123 mejlojn. Ŝalupservo funkcias de Port-of-Spain al la ĉirkaŭaj insuletoj, kaj guberniaj vaporŝipoj regule interkomunikas kun Tobago. Privataj omnibus-servoj veturas tra la insulo; en la ĉefurbo kaj antaŭurboj funkcias elektraĵoj. Ĉiuj ĉefaj lokoj estas interligitaj per efika telefonsistemo.

Ne estas sufiĉe da vortoj por esprimi la lukson de la palmfrangitaj marbordoj, kie oni povas bani en la blua akvo de la Kariba Maro

kaj petoli kun la alruliĝanta ondoŝaŭmo de l'Atlantiko. Agrablaj ekskursoj sub arkaĵoj de bambuoj laŭlonge de la vojoj kaj tra tre longaj plantejoj de sukerkano, kakao kaj sovaĝa arbaro kun ekvidoj al primitivaj kaj pitoreskaj dometoj de l' kamparanoj forlogas la vizitanton el la urboj.

Sep mejlojn oriente de Port-of-Spain staras la Imperia Kolegio de Tropika Agrikulturo, kie al studentoj el ĉiuj partoj de la mondo estas instruata la scienco kaj praktiko de tropika terkulturo.

Estas multaj okazoj por distrado. Krom la sanigaj marbanoj ekzistas interesplena marfiŝkaptado. Akvosporto estas havebla per motor-, vel- kaj remboatoj. El la subĉielaj amuzoj oni povas elekti ĉevalkuradon dum kelkaj tempoj de la jaro, kriketon de januaro ĝis julio, piedpilkadon kaj hokeon inter julio kaj decembro; rajdadon, tenison kaj golfludojn oni povas ĝui dum la tuta jaro. Diversaj kluboj sociaj akceptas membrecon por dancado, badmintono, briĝo kaj bilardo. Modernaj kinoteatroj prezentas variajn programojn de la lastaj sonfilmoj, kaj teatraĵoj, muzikaj kaj vodevilaj prezentadoj kelkfoje okazas de profesiaj geaktorj aŭ de lokaj talentuloj.

Kiuj ŝatas pli ripozan libertempon, povas viziti unu el la malgrandaj insuloj aŭ Tobagon, la insulon de Robinsono Kruso, kie oni povas pasigi pace kaj kviete la tagojn en la saniga sunlumo kaj rejuniga aero.

La grandaj butikoj en la komerca sekcio de Port-of-Spain estas ekipitaj por kontentigi la distingeman vizitanton, kaj la prezoj estas favoraj kompare kun tiuj en la pli grandaj urboj de la norda latitudo. Guberniaj konstruaĵoj kaj imponaj komercaj domoj favore impresas la vizitanton pri la progresema spirito de la tuta kolonio.

La ĉefaj produktoj de la kolonio estas agrikulturaj kaj mineralaj. La unuaj konsistas en kakao, sukero, kokoso, kafo, citrusfruktoj kaj bananoj; la lastaj estas petrolo kaj asfalto. Valore petrolo reprezentas ĉ. du trionojn de la tuta eksporto de la kolonio. La importoj konsistas ĉefe en fabrikitaj varoj.

Kvar privataj bankoj funkcias en la kolonio kun reprezentaj ĉefoficejoj kaj korespondantoj en ĉiuj partoj de la mondo. Oni uzas britan monstemon, krome bankbiletojn de kvin, dudek kaj cent dolaroj. La gubernio eldonas biletojn de unu kaj du dolaroj.

Detaloj pri ŝiplinioj, loĝejoj, pasportoj kaj vojaĝkostoj estas haveblaj ĉe la subaj adresoj aŭ ĉe vojaĝ-agentejoj. Estas multaj loĝejoj taŭgaj por ĉiuj gustoj kaj poŝoj. Detalan liston de hoteloj kaj tarifoj sendas laŭpete la sekvantaj adresoj:

Tourist Inquiry Bureau, Custom ouse, Port-of-Spain, Trinidad, Brit. West-Indies;
West India Committee, 14, Trinity Square, London E.C. 3, Anglujo;
Trade Commissioner for the B.W.I. (Eastern Group), 225, Board of Trade-Building, Montreal, Kanado.

La supra artikolo estas mallongigita traduko el la ilustrita turistlibro, eldonita de la « Tourist and Exhibitions Board of Trinidad and Tobago »; kun permeso de la aŭtoro tradukis el la angla lingvo: W. B.

La kontraŭuloj asertas ke Esperanto ne havas animon. Ni esperantistoj scias pli bone. Sed ni ja trankvile lasu ilin kredi ke ĝi ne havas animon! La pure teknika ĝuas nuntempe pli grandan ŝaton ol la animhava, kaj antaŭ ĉio ĝi estas nuntempe pli volonte kredata kaj akceptata. Se Esperanto estus nura maŝino, delonge ĝi estus ĝenerale akceptita.

Roy F. Schreiber:

Fuŝita de la Sorto

Arturo Hagl, multe respektata, honesta, tamen ne tre prospera, diligenta laboristo sidis apud la radio en la malriĉe ekipita salono de l' malgranda ĉambro, kiun li kaj lia edzino, Gertrudo, nomis hejmo. Ial lia animstato estis malbona. Verŝajne pro la malhelpaĵoj, kiuj lin ĉagrenis rilate al monaferoj. Al li ĉiu alia ŝajnis pli feliĉa.

Dramo pri viro suferinta kapvundon, kaj tial fariĝinta kompatinda, tute ne kulpigebla ŝtelmaniulo, sin reproduktis sur la ricevilo.

Multe tro okupita pri siaj propraj problemoj, Arturo ne atentis la radion, tamen, ne sciante, li subkonscie instigiĝis.

Estis malfrua horo. Gertrudo jam antaŭ longe enlitiĝis kaj nun pace dormis. Arturo, reveninte hejmen de la laboro iom malfrue, estis fininta sian banon unu horon antaŭe kaj nun, ĉi tie, li malrekte sidis sur la ununura, malnova apogseĝo en sia hejmo. Li ne dormis, sed ankaŭ ne estis tute veka — sed laca kaj senespera.

Dum la radio-horsignalo sonoris, voĉo anoncis la noktomezon kaj salutis ĉiujn aŭskultantojn: « Bonan nokton! ». Tuj la malgranda, malhele lumigita ĉambro fariĝis strange silenta. Nur restis malforta zumado ĉe la radio kaj la sono de l' spirado de Gertrudo, venanta el la apuda dormoĉambro.

La subita silento kvazaŭ saltigis Arturon, tiel ke li sin rektigis, per la malantaŭa flanko de unu mano frotis la okulojn, oscedis, kaj per la alia mano palpserĉis, trovis kaj premis la komutilon por malfunkciigi la radion. Tiam, dum li ekbruligis unu plian cigaredon kiun li volis fumi antaŭ ol enlitiĝi, eniris lian lacan cerbon solvo por liaj problemoj.

Faldante la malmolajn manojn sur unu genuo, li mallaŭte konsilis sin. « Kial do ne? La vivo nur estas por trompuloj, ne por honestaj homoj kaj malsaĝuloj. Sed krom mi, neniu devas iam scii la veron, eĉ ne Gertrudo. Ĝi mortigus ŝin. » Post kelkaj enspiroj de cigaredofumo, li daŭrigis: « La ŝovelado de karbo la tutan vintron, kaj la liverado de glacio la tutan someron ne estas mia koncepto de paradizo. »

Pasis pluaj kvin minutoj, dum kiuj Arturo detale rekonsideris siajn ĵus faritajn planojn. Tiam, estante tre aplomba, li estingis la mallongan restaĵon de sia cigaredo kaj kuŝiĝis. Li decidis, ke li ne prokrastos, ĝis kiam la ideo kristaliĝos. Ĝi okazu ĝuste tiun nokton.

*

En la mezo de malespero, dum malĝojo, kaj eĉ dum momentoj de laceco, ideoj tute neatenditaj enkapigis al homoj — ofte bonaj, same ofte malbonaj. Malfeliĉe, tiu de Arturo estis unu el ĉi-lastaj, — tre malnobla.

Ĉiu ja scias, ke iom ofte okazas, ke homoj ricevintaj kraniovundojn, aŭ severan ŝokon, tute perdas la memoron, aŭ viktimiĝas al iu alia mensa malsaneco. Iufoje tiaj malfeliĉuloj povas esti resanigataj de praktikantoj de mensa scienco, aŭ, pli bone dirite, de cerbofakuloj. Kvankam miriga ĝi eble ŝajnas, kelkokaze tiaj afliktitoj resaniĝis pro ŝoko aŭ vundo simila al tiu, kiu unue kaŭzis la frenezecon. Iukaze, resaniĝo povas, aŭ ne povas lasi ilin nesciantaj pri aferoj okazintaj dum la tempo de mal-saneco. Ĉi tiu per radio revivigita scio estis la gepatra semo de la ekflorajaĉo en la kapo de Arturo.

Arturo Hagl konstatis, ke en la mal-lumo de la nokto estus tre facile erare iri al la pordo kondukanta al la ŝtuparo anstataŭ al la pordo kondukanta en la kuirejon, precipe tiam, kiam oni estas dormema. Li memoris, ke jam ofte li el-litiĝis dum la nokto kaj iris tra la salono, kaj de tie eniris la kuriejon por havigi al si ĝlason da akvo. Kutime li tion faris sen la helpo de lumo, kaj neniam eĉ frapis la piedfingrojn kontraŭ iun meblon. Sed certe tia eraro pri pordoj devus esti pardonebla almenaŭ unufoje.

Lia skemo por solvi siajn problemojn estis, ke li faros ĝuste tiun eraron kaj malsuprenfalos la ŝtuparon. La falon li igos sufiĉe brua por ke ĝi veku Gertrudon kaj kelkajn el la aliaj loĝantoj de la domo, ĉar ju pli multaj vidantoj estos, des pli bone. Certe, la ago povos esti danĝera, tamen, li zorge riskos ĝin. Atinginte la malsupron, li realigos decan ŝvelaĵon ĉe la bazo de la kranio per ekstra frapo kontraŭ la plankon. Tiu ŝvelaĵo estos la plej necesa el ĉiuj. Jen, li plizorgos, ke neniam eraretoj disfendu la akton!

Kompreneble, Doktoro Hink estos alvokata por esplori lin; sed li, Arturo, ne rekonos lin; li rekonos nek la kuraciston, nek Gertrudon, fakte, li rekonos nenion, — eĉ ne sin. Jes ja, la doktoro diagnozos la malsanon kiel mensan ŝokon, sed li uzos iun de li, Arturo, ne elparoleblan vorton. Li portos sian plej seriozan mienon kaj konvinkos Gertrudon, ke li, Arturo, reatingos sian memoron post unu, eble du tagoj.

La venontan tagon, dimanĉon, li ŝajnigigos esti dormema la plejmulton de la

tempo. Efektive, li devos tion fari por ne devi respondi tro multajn respondojn de simpatiaj vizitantoj, al kiu racia respondo ruinigos la tutan skemon.

Lundo venos, kaj kun ĝi dua, tria, aŭ eble eĉ kvara vizito de Doktoro Hink, kiu denove certigos al Gertrudo, ke li, Arturo, ne estas en danĝera stato, ke li ree laboros antaŭ ol preterpasos la semajno.

Tiam, ĝuste antaŭ la tagmezo lundon, dum Gertrudo estos ĉe la spicisto, li devos kolekti ĉiom de sia kuraĝo, enpoŝigi sian revolveron, kaŝe eliri tra la malantaŭa pordo, iri al la Neĝoblanko-Lavejo, kaj tie, sin kaŝante, atendi ĝis kiam la tieaj laboristoj iros hejmen por tagmanĝi. Poste li ŝtelos ŝarĝaŭtomobilon, malgrandan, — tamen rekoneblan. Carbosana krimulo certe ne farus tion.

Tiam venos la klimakso de la akto: la elrabo de la urba banko!

La urba banko neniam estas tre bone gardata je tagmezo. Ankaŭ tiun tagon oni ne speciale prizorgos tiun kvazaŭan inviton al banditoj.

Li estas konata ĉe la banko; li negocas tie. Plie, li estas konata preskaŭ ĉie en la urbeto. Tamen, ne gravas, ĉar ĝis lundo rakonto estos cirkulinta tra la tuta urbo, ke li falis, vundis al si la kapon kaj nun ĉestas freneza. Tiuj prudentaj viroj en la banko ne kontraŭstaros lin. Baraktado kontraŭ armita lunatikulo estos tro danĝera.

Sukcese elrabinte la bankon, li rapide forveturos en la kamparon per la ŝtelilta ŝarĝaŭtomobilo. Li ne devos veturi malproksimen antaŭ ol forlasi la veturilon. Li kuros tra la arbaro ĝis la ne plu ekspluatata karbominejo, en kiu li kaŝos la rabajon. Zorginte ne lasi postsignojn proksime de la trezoro, li piediros laŭ alia vojo reen al la urbo, kie, ŝajnigante esti freneza, li faros nenion por evti esti tuj arestata.

Mensa ekzameno senescepte sekvos. Ne, li ne memoros pri la rabado, ankaŭ ne pri la falo. Kaj Doktoro Hink kaj la aliaj loĝantoj de la domo, krom Gertrudo, estos tie por atesti pri lia akcidento. Oni portempe malliberigos lin en la ŝtata frenezulejo.

Post kelka tempo li resaniĝos kaj estos liberigata, sed malbonŝance por la bankistoj li memoros pri nenio okazinta dumtempe. La cetero estos sufiĉe facila.

*

Je la sekvanta lundo aperis artikolo en la urba gazeto, kiu komencis jene:

« Arturo Hagl, bone konata urbano, estis tuj mortigita dimanĉon matene, kiam li malsuprenfalas ŝtuparon en sia hejmo. Postmorta esplorado malkaŝis, ke rompita kolo estis kulpa. Mortenkonto okazos... »

Mieczysław Braun:

Notaĵo.

La plej belan por poeto
Kanton fortan en art' senta
Al mi flustris en sekreto
La kor' nokta, plej silenta.

Ĝus la sonĝo-forkuranto
Malaperis kvazaŭ fumo,
Mi forgesis mian kanton
Dum la sobra taga lumo.

(Ei pola originalo esperantigis la aŭtoro.)

**La knabo kiun oni vendis
por ĉevalo**

Je la 20-a septembro 1937 mortis en Torquay, Anglujo, s-ro John T. **Holmes**, fervora laborinto por nia movado. La sek-vanta artikolo estas aparte interesa, kiel la lasta tradukaĵo, kiun li faris. Ĝi aperis anglalingve en la ĵurnalo « News Chronicle », kaj estas publikigata kun la permeso de la aŭtoro, s-ro J. S. **Childers**.

Kurbdorsa maljuna nigro, portante plen-brakon da sovaĝaj floroj, paŝadis tra la polvo de ŝoseo de Alabama al unu el la konstruaĵoj de la Instituto de Tuskegee.

Kompatinda maljunulo: mi jam vidis centojn similajn. Tute nesciaj, neblaj legi aŭ skribi, ili paŝadis sur sudlandaj vojoj serĉante diversajn okupojn.

Ĉe la pordo de unu el la konstruaĵoj mi vidis nete vestitan sekretarion rapide alpaŝi al la kurbdorsa maljunulo: « Tiu Deleĝitaro de Washington atendas vin, Doktoro Carver. »

Fantazie kiel tio ŝajnas, tiu ĉi malorde vestita maljunulo estis neniu alia ol la eminenta sciencisto de Instituto de Tuskegee Doktoro George Carver, fama pro sia kemia magiceo.

De la arakido¹⁾ li eltrovis preskaŭ tri cent utilajn produktaĵojn; inter ili estis fromaĝo, kando, kafo, piklaĵoj, oleoj, razosmirajo, tinkturoj, grasoĵoj, linoleumo, faruno, matenmanĝaĵoj, ŝapo, vizaĝpudro, kaplavaĵo, presinko kaj eĉ aksograsaĵo.

El lignaj rabotaĵoj li faris sintezan marmoron. E! la koto de marĉoj kaj la folioj de arbara grundo — valoran sintezan sterkon. El bova sterko — kolorigaĵon.

El la batato²⁾ li faris pli ol cent produktaĵojn; inter ili: amelo, farungluo por libroj, vinagro, ŝu-ciro, inko, tinkturoj, melaso.

Spertuloj diras ke li faris pli ol iu ajn alia vivanto por restarigi agrikulturon en la sudo de Usono.

Kaj ankoraŭ plu. Doktoro Carver estas artisto, aparte lerta pri pentrado de floroj.

Ankaŭ li estas lerta muzikisto — unufoje li vojaĝis en la mezokcidento de Usono kiel koncerta pianisto.

Li naskiĝis en elementa sklava kabano ĉe la farmo de Mozeo Carver apud Diamond Grove, Montana.

Kiam li estis sesmonata, noktorabistoj forportis lin kaj lian patrinon. La rajdistoj neniel prizorgis la infanon: li atakiĝis de kokluŝo kaj estis mortonta, kiam sendito de Mozeo Carver alvenis por reaĉeti la forrabitajn sklavojn. La patrino jam malaperis; neniu iam ajn sciigis, kio okazis al ŝi. La infanon oni revendis al lia antaŭa posedanto por kaduka konkursĉevalo.

Gesinjoroj Carver edukis la malsanan infanon, nomante lin George Washington. Malforta kaj subnormala laŭ staturato, li faris domajn taskojn, fariĝante bonega kuiristo kaj lernante ripari vestojn.

La gesinjoroj deziris ke li ricevu lernejan edukadon, sed ili ne proponis pagon. Sen eĉ

unu cendo li ekiris al lernejo malproksima dek du kilometrojn. Sola inter nekonatoj, li unue dormis en malnova ĉevalejo. Baldaŭ li trovis diversajn okupojn kaj eniris la lernejon.

Iom pli ol dudek-jara, finite la gimnazian kurson, li sendis per poŝto peton pri eniro en kolegion en Iowa, kaj oni akceptis lin (ankaŭ per poŝto). Sed, kiam li alvenis, oni rifuzis en-lasi lin pro tio, ke li estis nigro.

Ne malkuraĝigite, li ankoraŭ unufoje laboris en diversaj okupoj. Post nelonge li havis sufiĉan monon por starigi malgrandan lesivejon.

Proksiman jaron li eniris la Kolegion Simpson en Indianola, Iowa. Paginte la enirkoston li ankoraŭ posedis dek cendojn, kaj li devis subteni la vivon dum unu semajno per maizofaruno kaj bovsebo.

Dum tri jaroj li laborege studadis, tiam en 1890 li enskribiĝis en la ŝtata Kolegio de Iowa. Post kvar jaroj li fariĝis licenculo en agrikulturo, paginte ĉiujn siajn proprajn elspezojn.

Liaj atingitaĵoj tiel impresis la aŭtoritatulojn de la Kolegio, ke ili elektis lin al la Kolegia Fakultato.

Kiam li estis en la Ŝtata Kolegio de Iowa, s-ro Booker T. Washington invitis lin al Tuskegee. Akceptinte tiun inviton, Carver vidis grandan okazon servadi sian propran popolon en la sudlando. Li rekonis ke la kotonaj kampoj grade ĉesis produkti kotonon, pro tio ke oni ne laŭvice plantis diversajn kreskaĵojn. Li vidis ŝuld-ŝarĝitajn farmistojn kontraŭantaj ruino. Li dediĉis sin por prediki evangelion de monhavigaj rikoltoj, aliaj ol kotonaj, kaj per studado kaj eksperimentado li decidis ke la sudlanda farmisto pli certe havigus monon kaj farus malpli da domaĝo al siaj bieno per kultivado de arakidoj kaj batatoj. Doktoro Carver komencis verki bultenojn kaj fari paroladojn por pruvi siajn konkludojn.

Post iom da tempo sudlandaj farmistoj pligrandigis la areon, sur kiu ili kulturis arakidojn kaj batatojn, kaj tiam subite kaj malĝoje Doktoro Carver konsciis kion li faris. Li pligrandigis la kvanton sen pligrandigi la demandon. La arakido kaj batato putriĝis: la farmistoj, kiuj estis plantintaj ilin, perdis sian havaĵon.

Preskaŭ kolere la nigra sciencisto eklaboris, pasigante tagojn kaj noktojn en sia laborejo, serĉante kiel utiligi la arakidojn kaj batatojn.

Trovinte flank-produkton li malavare kaj tuj donacis ĝin al la mondo, petante nur ke oni uzu ĝin por la bono de la homaro.

Neeviteble lia laboro alportis proponojn lasi Tuskegee. Iu homo tentis la maljunulon, proponante salajron de 20.000 funtoj. Li rifuzis ĝin.

Li restadis en Tuskegee, kie lia malgranda salajro rapide foruziĝas per pago de la elspezoj de indaj knaboj, kaj blankulaj kaj nigrolaj, kiuj provas havigi edukadon.

Li ankoraŭ surportas la malnovan alpakan jaketon kaj nigran pantolonon, kiujn li tiel ofte riparas, kaj kravatojn, kiujn li trikas el fibroj faritaj de li mem.

Kiam la Usona Registaro pritraktis la tariflegon de Hawley-Smoot, sudlandaj farmistoj vane petegis por imposto je la arakido. Fine deklaro da homoj sin prezentis antaŭ la Komitato — ĉiu el ili uzante per alparolado la permesitajn dek minutojn.

En la fundo, Doktoro Carver kun tremantaj manoj atendis sian vicon. Lasta sur la listo, li paŝis antaŭen por alparoli la komitatanojn jam ellacigitajn pri la arakido.

La maljunulo prenis sian lokon post la tablo, kie montriĝis kelkdudekoj da produktaĵoj, kiujn li faris. Simple, ridetante modeste li diris, kiel li petis: « Dio, kio estas la arakido, kaj kial vi kreis ĝin? » kaj kiamaniere li serĉis respondon; kiel li eltrovis el la arakido produktaĵojn etendiĝantajn de vizaĝpudro ĝis lignajaj tinkturoj.

Parolante li montris ĉiujn produktaĵojn, kiujn li la modesta nigro antaŭ ili, trovis en sia laborejo en Alabama.

Ĝuste je la limo de la dek minutoj, Doktoro Carver dankis la Komitaton, riverencis kaj ekiris al sia loko en angulo.

Sed la Komitato ne permesis al li foriri: ili postulis ke li daŭrigu sian rakonton. Li paroladis unu horon kaj kvardek minutojn, kaj la arakido enskribiĝis en la tarifon.

Unu tagon, post kiam mi vidis la ŝnuron faritan el okra fibro, inzulan tavolon de arakidaj ŝeloj, kaj tinkturojn el la leontodo, bulbo, kaj tomato-liano, mi demandis Doktoron Carver, kiel li trovis tempon por ĉiuj siaj farataĵoj?

« Plejparte, ĉar mi faris al mi regulon leviĝi ĉiun matenon je la kvara, » li diris. « Mi marŝas en la arbarojn. Sola tie kun la objektoj, kiujn mi plej amas, mi kolektas specimenojn kaj studas la grandajn lecionojn, kiujn la Naturo tiel volonte instruas al mi. En la arbaroj ĉiujn matenojn, dum la plimulto da aliaj personoj dormas, mi plej bone aŭdas kaj komprenas la planon de Dio por mi. »

Dum li sin fortunas por kliniĝi super sia mikroskopo, mi aŭdis lin murmuri al si: « La Dio estas bonega al tiu ĉi kompatinda maljuna Nigro. »

¹⁾ arakido = terglano, ternukso; oleoriĉa planto el grupo de legumencoj (« arachis »).

²⁾ batato = dolĉa terpomo; grupo de konvolvulacoj (« batatas »).

Rido sanigas**Bonega rimedo.**

— Mi ĵus renkontis vian nevon. Kia abomena homo li estas!

— Jes, terure abomeninda. Feliĉe mi ne plu revidos lin.

— Kie! vi sukcesis deteni lin?

— Tre simple: mi pruntedonis al li dek guldenojn, kaj diris ke li repagu ilin ĉe sia venonta vizito...

La momentfoto.

— Jen, kara Katrinjo, mi havas fotografaĵon de via patrino. Ĝi certe estis farita dum milono de sekundo.

— Kial dum milono de sekundo?

— Ĉar ŝi ĝuste estas tenanta la buŝon fermita.

Pro la kutimo.

— Sinjoro Svatul, vi povas gratuli vin pro tio ke vi sukcesis edzinigi ĉiujn viajn ses filinojn.

— Vi komprenas, ke tio estis nefacila laboro, kaj nun mi tiom kutimiĝis al ĝi, ke mi decidis fariĝi edzec-peristo.

Antaŭ la foriro de la ŝipo.

Pasaĝero: Ĉu mi havas ankoraŭ la tempon por iri kisi mian edzinon antaŭ la foriro de la ŝipo?

Sipestro: Kiel longe vi estas jam edzigitaj?

Pasaĝero: Dek jarojn.

Sipestro: Vi havas ankoraŭ sufiĉe da tempo.

Nu, tial!

Antaŭ la preĝejo staras scivoluloj. Ili rigardas tra la portalo internen.

Sinjoro preteriranta demandas knabon, kion do oni povas tie vidi.

— Policisto ĵus forkondukis junedzinon for de la altaro, respondas la bubo.

— Ho Dio! Kial do?

— Li edzinigis ŝin.

La sola ebleco.

— Vi, najbaro, ĉu via edzino ne insultas, kiam vi venas hejmen nur matene?

— Neniel.

— Kiel tio estas ebla?

— Tre simple: mi restis fraŭlo.

LA ESPERANTISTA REKLAMO

La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldenon, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 (s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

Danko. Regina kaj Jokubas Kanas, **Panevezys, Litovujo,** kore dankas al ĉiuj gesamideanoj, kiuj afable gratulis ilin okaze da ilia geedziĝo

Sudetgermana grupo « Verda Stelo » petas multnombrajn skribaĵojn el la tuta mondo por **letervespero** januarfina. Respondo garantiata. Marie Schiffner, **Reichenau 519,** bei Gablonz a.N., Ĉeĥoslovakujo.

Adresanĝo. Bonvolu noti la novan adreson de Brazilo Ligo Esperantista: Praça da República 54, **Rio-de-Janeiro, Brazilo.**

Praha, Ĉeĥoslovakio. Esperanto-klubo «Verda Stelo» denove transloĝiĝis, al la kafejo «Hybernia», Praha II, Hybernská 26, kontraŭe de Masaryk-stacidomo. Kunveno ĉiunmerkrede.

Atentu adreson! Hungara Esperanto-Federacio denove petas, ĉion sendi al ĝi per adreso de la eferviganta prezidanto: Jozefo de Michalik, profesoro, Bejczy-u. 1, **Sashalom,** ĉe Budapest, Hungarujo.

Knabinoj Clyde Savaget (11-jara) kaj Edna Savaget (9-jara), Ladeira Santa Teresa 113, **Rio-de-Janeiro, Brazilo,** deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kun knabinoj de la tuta mondo.

En Riga, Latvujo, ĵus estas restarigita la Grupo de Esperantistaj Tramistoj, sub la gvido de s-ro T. Arbergs, la IEL-delegito. La grupo estas entuziasma sed malriĉa, kaj la membroj estos tre dankaj, se oni foje povos sendi al ili uzitajn Esperanto-gazetojn. Adresu al: T. Arbergs, Ives iela 4-2, **Riga.**

Filatelistoj tutmondaj! Mi havas poŝtmarkojn svedajn, novajn kaj malnovajn, jubileajn kaj ordinarajn, kaj deziras interŝanĝi kun seriozaj filatelistoj. Tuja kaj certa respondo. Ne sendu malpli ol 50 ekzemplerojn kaj prefere du el ĉi. Adreso: Ivar Engström, Bergsättra, **Ödeshög, Svedujo.**

Alvoko! Mi tre ŝatas konatiĝi kun gesamspiritanoj-esperantistoj el diversaj landoj kiuj, agnoskante unuflanke la aŭtoritaton de Jesuo Kristo kiel Savinto de la tuta mondo, aliflanke estas konvinktitaj, ke la Socialismo plej bone konformiĝas en nia tempo al la postuloj de socia justeco laŭ la Evangelio. La celo estas serĉi kontakton por poste servi al la internacia celado al interpacigo de Kristanismo kun Socialismo. — J. L. Bruijn (esperantisto de 1906), Daguerrestraat 158, **Den Haag, Nederlando.**

Grava! Ĉiu persono, kiu skribos en Esperanto al: Detroit Convention & Tourist Bureau, 1005 Stroh Bldg., **Detroit, Michigan, Usono,** — ricevos laŭdezire senpagan ekzempleron de belega, multilustrita gvidlibro „Detroit, la Urbego Belega“, 35 paĝoj, aŭ en angla, aŭ franca, aŭ hispana lingvo. Skribu plej baldaŭ! Skribu plej multnombro! (462)

Samideanoj tutmondaj! Sendu al mi respond-kuponon, kaj mi sendos 20-paĝan interesan Biblian studplanon. M. Björklid, **Nässjö, Svedujo.**

La memoron plifortigas D-ro D. Fajŝtejn, Vilno (Pollando), Zawalna 15. — Postulu senpage detalajn prospektojn de nemonika perkoresponda kurso en Esperanto! (463)

Poŝtmark-interŝanĝo. Mi interŝanĝas polajn aŭ alilandajn poŝtmarkojn kontraŭ samkvanto da vialandaj. Mi ne sendos unue. Pollando, **Torun, Chelminska 5, Grodski.**

Internacia poŝtmarka ekspozicio Praha 1938 en Praha, 26.6-4.7.1938. Samideanoj, dezirantaj tradukadi tekstojn pri ĝi kaj sendadi ilin al sialandaj filatelistaj gazetoj, estas petataj turni sin al s-ro V. Šavel, Strašnice, Rybnický, **Praha, Ĉeĥoslovakio,** kiu sendos al vi raportojn tiurilatajn senpage. Li petas nur pruv-ekzemplerojn okaze de apero de liaj informoj. Same li donas informojn kontraŭ respond-kuponon al ĉiuj filatelistoj.

Juna ŝuisto deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, eventuale leterojn kun gesamideanoj tutmondaj. Certe respondas, se la adreso estas legeble skribita. Emanuel Oscarsson, **Adolfsberg, Örebro, Svedujo.**

Du svedoj deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, eventuale leterojn. Nils Sandberg, Toringsgatan 31, **Örebro;** Olov Eliasson, Solgatan 5, Hagaby, **Örebro, Svedujo.**

10 lernantoj en popolaltlernejo deziras korespondi. Respondo garantiata. Skribu ĝis la 30a de Marto al Dybkjaer, **Vallekilde, Danlando.**

Por du internaciaj respond-kuponoj vi ricevas 32-paĝan interesan libron «Vorto Viva» pri la biblio, por unu respond-kuponon biblian studplanon. Ni volonte respondas pri religiajn demandojn. Sveda K.E.L.I., **Kumla, Svedujo.** (454)

Naciajn policajn fakrevuojn kun laŭebla resumo de ilia enhavo ŝatus ricevi D-ro V. Tóth, pollickapitano, **Budapest III., Jolsva u. 5, Hungarujo.** Rekompenca li faros la saman aŭ interŝanĝe sendos dezirotajn.

Atentu! Tri svedaj esperantistoj deziras korespondi kun gesamideanoj el fremdaj landoj. Estas interesitaj pri ĉio. — N. E. Beckelin, Funkisgatan 3, **Västerås, Svedio.**

Sveda junulo deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun gekolektantoj de la tuta mondo. Adreso: Elnor Sundqvist, Stettin, **Katrineholm, Svedujo.**

Irène Fink, 41 Bd. Moulay Joussef, Casablanca, Maroko, Afriko, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun ĉiulandanoj. Aŭfranku per novaĵoj!

18-jara dana buterfaristo deziras korespondi kun la tuta mondo. S-ro R. Fiirgaard, Ebeltoft Mejeri, **Ebeltoft, Danujo.**

Ĉu vi deziras ricevi gvidfolion pri bela malnova urbo, samtempe propagandante Esperanton? Sendu ilustritan poŝtkarton (mencianta ĉu eldono angla, germana aŭ franca preferata). D. Williams, 25 Sefton Road, **Hoole, Chester, Anglujo.**

Cent junaj kaj mezaĝaj Cseh-kursanoj (komencantoj) de T. Morariu en sveda Laponujo deziras korespondi kun tutmondaj gesamideanoj, per adresoj: 1. A. Nilsson, A.B. F., **Kiruna, Svedlando;** 2. Instruisto T. Keskitalo, **Vittangi, Svedlando;** 3. Instruistino H. Thelander, **Lainio,** poŝtadreso Vittangi, Svedlando.

Informojn pri Kosmopoliso sendos senpage laŭ peto: S-ro E.P. Ockey, 78 Forest Road, **Dalston, London E.8, Anglujo.**

Kvakerismo kaj Paco. Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1, Anglujo.** (432)

Skribaj kursoj (por hollandlingvanoj), por diplomoj A kaj B. Gvidanto: Simon Aarse. «La Verda Stelo», Radioweg 45, **Amsterdam-O., Nederlando.** (449)

Norvega filologia studento serĉas korespondanton en franca lingvo. Skribu al: Norvega Esperantista Ligo, Boks 353, **Stabekk, Norvegujo.**

Peto al judaj samideanoj! Suferigito pro pogramo en pola urbeto petas helpon de judaj gesamideanoj. Adreson de l' suferigito komunika la redakcio de tiu ĉi gazeto (sendu respond-poŝtkarton aŭ aldonu respond-kuponon), se oni indikos la ĉifron M.M. 46.

Mi volas interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo. L. Wozarik, Rottenbiller-u.12, **Budapest VII., Hungarujo.**

Korespondado. 50 gelernantoj de f-ino Saxl deziras korespondi kun ĉiulandanoj. Neprer respondos. Skribu al s-ro Oscar Hvidbjerg, horloĝisto, Aagade 30, **Aalborg, Danlando.**

Filatelistoj tutmondaj! Mi havas skandinavajn poŝtmarkojn kaj deziras interŝanĝi kun seriozaj filatelistoj. S-ro M. Gudmundsen, 5 Juni Plads, **Kopenhagen, Danlando.**

Kiu volus viziti Ĉeĥoslovakion en 20-a jaro de ĝia sendependeco kaj vidi belegan 10-an Tutsokolaran Kongreson en jaro 1938? Unu-aŭ plurmonata restado interŝanĝe por la restado en lando de interesiĝanto. Interŝanĝado de leteroj, poŝtkartoj ilustritaj, fotografajoj, gazetoj ktp. Skribu al adreso: Joe Motliček, **Drahotúše (Moravio), Ĉeĥoslovakio.**

Grupo (59 gemembroj) deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj, precipe el Sovetio kaj Ameriko. Adreso: Willem van Tessel, Tutenberg 15, **Betekom, Belgio.**

S-ino Frida Larsson, Norrlandsgatan 30, Norrköping, Svedujo, deziras ĉiulandan korespondadon kaj interŝanĝadon poŝtmarkan.

Biblioteko de mortinta samideano estas vendota bagatelpreze. Liston petu de E. Baranyai, Kálvária utca 27, **Budapest VIII, Hungarujo.**

Kio plej multe valoras aŭ valoru por homo? Pri multaj opinioj, precipe de filozofie, religie, naturscienco, sociale, politike interesitaj gesamideanoj petas D-ro R. Raupp, **Friedberg i.H., Germanujo, Bismarckstr. 15.** Certe respondos.

Franca dentisto ŝatas interŝanĝi papiliojn, poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj medicinajn revuojn kun amatoriĝo ĉiulandaj. Neprer respondas. J. Devis, dentisto, **Lillers, (P.d.C.), Francujo.**

Petu la interesan 16-paĝan broŝuron pri la batalo ĉe Izero! Senpage alsendas: Cl. de Landsheer, Maria Doolaeghestr. 35, **Diksmuide, Belgujo.**

La Biblio estas libro plej legata, plej dezirata. Por ricevi senpage parton el ĝi en iuj lingvoj, skribu tuj al la Domo de la Biblio, Dept. A.B.J., **Genève, Svislando.**

Ilustritan faldprospekton pri Ĉeĥoslovakio senpage sendas al niaj legantoj: Ĉeĥoslovaka Esperantista Informejo, Uralské 9, **Praha XIX Ĉeĥoslovakio.**

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.